


EL POPOLA CINIO

人民中國報道

2 · 1964





Vaporturbino en Muntado

Foto de Geng Guanghua

En Kvin Jaroj

EN aŭgusto pasintjare, la membroj de nia popola komunumo "la Unua de Aŭgusto", Nanĉang-gubernio de Gianghi-provinco ĝojplene festis la 5-an datrevenon de la stariĝo de la komunumo.

GRANDA ŜANĜIĜO

Ekde la stariĝo de la popola komunumo okazis ĉe ni vere granda ŝanĝiĝo.

De generacio al generacio, ni kamparanoj ĉiam kulturis la teron nur per helpo de bovo, norio kaj ŝpato. Sed nun ĉe ni ili estas jam anstataŭitaj de traktoroj, elektraj pumpiloj, draŝmaŝinoj kaj senŝeligiloj.

Nia komunumo situas sur la ebenaĵo inter la riveroj Fuhe en la oriento kaj Gangiang en la okcidento, tie ofte minacis jen inundo jen sekegeco. En la pasinteco, ni malofte povis akiri unu abundan rikolton dum tri jaroj. Nun, el la pli ol 1670 hektaroj da niaj kulturataj kampoj pli ol 90 elcentoj estas aŭ nature irigaciataj aŭ mekanike irigaciataj kaj nur malmultaj unuope izolitaj teras-kampoj estas irigaciataj ankoraŭ per la malnovaj norioj. La traktor-stacio de la komunumo kapablas jare plugi kaj erpi 466 hektarojn da kampoj. Dum la lastaj kvin jaroj, kvankam okazis ĉe ni kelkfoje seriozaj katastrofoj de inundo kaj sekegeco, ili tamen ne povis kaŭzi al nia produktado grandan damaĝon. Ekzemple en la jaro 1962, okazis la senprecedenca akvego kaj sekegeco dum daŭro de pli ol 80 tagoj, sed la produktokvanto de greno eĉ superis tiun de 1961 je 8 elcentoj. De

la vintro de 1962 ĝis la printempo de 1963, dum pli ol 200 tagoj pluvo falis ĉi tie eĉ ne unu fojon sate. Se tio okazus antaŭ la Liberiĝo, rikolto estus ne imagebla. Sed en la jaro 1963, la fruaj kaj mezaj rizplantoj kreskantaj sur pli ol 1300 hektaroj da tero de nia komunumo estis rikoltitaj plenabunde en suma kvanto de pli ol 4,515,000 kilogramoj. La pomu-a produktokvanto eĉ superis tiun de la plej bona rikolto en la historio.

LA VIVO GUSTAS KIEL SUKERKANO


Pri la vivo la komunumanoj ofte diras, ke nia vivo gustas kiel sukercano manĝata de supre: estas ĉiam pli dolĉe. Mi trovas la aserton tute trafa.

Kiu el niaj malriĉaj kamparanaj familioj ne nutris sin duonjare per legomo kaj brano kaj nur duonjare per greno antaŭ la Liberiĝo? Estis multe da familioj kiuj ne povis kuiri por si manĝaĵojn eĉ en la tagoj de Novjaro kaj aliaj festoj. Pri la vestaĵoj oni simple ne parolu. Peco da eluzita kotonvatita vesto ofte devis servi por dekoj da jaroj kun multaj flikadoj unuj sur la aliaj.

Kaj nun? Inter la pli ol 3100 familioj de la komunumo kun pli ol 15.000 anoj, neniu nun ĉagreniĝas pro manko de manĝo aŭ vesto. Neniu familio povas plene elkonsumi la ricevitan grenon. Por la novjaraj kaj festaj tagoj, la membroj senescepte sin okupas je preparado de porkaĵo aŭ kokaĵo. Ekzemple,

* *Agrikultura labormodelo kaj la direktoro de la popola komunumo "la Unua de Aŭgusto".*

La akvokonduka viadukto finkonstruita en 1963 sur la Ganfu-ebeno, Gianghi-provinco. Foto de Ĝan Venliang



por la Printempa Festo de la jaro 1963, sume pli ol 2000 porkoj estis buĉitaj en nia komunumo. Koncerne al vestaĵoj oni nun havas ilin en kompleteco por aparta uzado en somero, printempo kaj vintro. Tiuj, kiuj devis iri nudpiede dum frosta vintro antaŭ la Liberiĝo, nun jam portas baŭĉukajn botojn aŭ sportŝuojn por eliri dum pluvo. Antaŭe, multaj familioj loĝis en kadukaj kabanoj aŭ premis sin pli ol deko en unu malgranda ĉambro, sed nun multaj komunumanoj jam konstruis por si vastajn domojn el brikoj kaj tegoloj. En la lastaj du jaroj, ĉe nia komunumo nombras sin pli ol 300 tiaj familioj. Krome, pli ol 2000 familioj instaligis por si elektrajn lampojn kaj pli ol 200 familioj aĉetis biciklojn kaj radiaparatojn. Multe da komunumanoj havas ŝparmonon ĉe la ŝtata banko aŭ la kredita sekcio de la komunumo.

AL KLERIĜO

Rimarkindaj estas ankaŭ la atingoj en niaj klerigaj kaj la komunaj bonstatigaj laboroj dum la lastaj jaroj. En la pasinteco, la gefiloj de niaj malriĉaj kamparanoj ne havis eblon viziti lernejon, tial nur tre malmultaj el ni scipovis legi. Sed nun, ankaŭ niaj infanoj povas lerni en lernejoj. Nun en nia komunumo sin trovas 12 elementaj lernejoj kun pli ol 2900 geknaboj. Tio estas je 40 elcentoj pli multa ol la nombro antaŭ 5 jaroj. Post la fondiĝo de la komunumo ni nove starigis mezgradan lernejon kiu nun havas pli ol 150 lernantojn. El la junaj kaj plenkreskaj analfabetoj multaj jam scipovas legi dank' al klerigado en postlaboraj horoj. Dum la lastaj kvin jaroj, nia komunumo cetere edukigis pli ol 200 traktoristojn, pumpilistojn, agrikulturajn teknikistojn kaj kuracistojn. La komunumo fondis interalie ankaŭ hospitalon, akuŝejon kaj du kurac-staciojn.

SEKURECO POR LA PERDINTOJ DE LABORKAPABLO

La komunumo ankaŭ zorgas sekurigi la vivon de ne-laborkapablaj membroj kiaj kadukuloj, orfoj kaj vidvinoj. Ekzemple en 1961 kaj 1962, la komunumo kaj la produktaj brigadoj sume elspezis pli ol 14,000 juanojn** el la fonduso por komuna bonstatigo por ilin helpi. Komunumano Zeng Maŭtoŭ grave malsaniĝis en 1959, la komunumo pagis pli ol 400 juanojn por sendi lin en la Popolan Hospitalon de la gubernio kaj li restis tie kvar monatojn ĝis la resaniĝo. En 1962, alia komunumano Ĝang Hitang malsaniĝis kaj estis senpage kuracata por duonjaro en la komunuma hospitalo, ĉar lia familio havas multajn anojn sed mankas al ĝi laborforto. Ĉiuj ĉi tiuj malfaciloj estis nesolveblaj antaŭ la starigo de la komunumo.

ANTAŬ LA STARIGO DE LA POPOLA KOMUNUMO

Kiel do post la stariĝo de la popola komunumo okazis ĉe ni tiel grandaj ŝanĝoj? Mi tion klarigu per mia propra sperto.

Mi estis naskita en malriĉa kamparana familio, kiu estis tre mizera antaŭ la Liberiĝo. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la popola registaro ni renversis la regadon de la terposedantoj, reformis la agraran sistemon kaj finfine sukcesis nin suprenturni. Post la agrara reformo ni kamparanoj ekposedis teron, ne plu pagas terrenton kaj komencis havi malpezkorajn tagojn. Tamen ni malriĉaj kamparanoj estis subpremataj generacion post generacio kaj ekonomie tre malfortaj. Tial mankis al ni kulturaj instrumentoj kaj bovoj kvankam ni havis propran teron. Kaj antaŭ ni kuŝis ankoraŭ multaj malfaciloj por produkti kaj vivi. En mia hejmvilaĝo Lianhivan, troviĝis entute 52 familioj, kaj post la agrara reformo al 20 familioj ankoraŭ mankis bovoj kaj al multaj mankis norioj, plugiloj kaj erpiloj. En 1951, dum la plej okupita tempo de rizplantado, malriĉa kamparano Van Ŝaŭliu povis nur senhelpe rigardi la intensan rizplantadon de aliaj, dum siaj kampoj restis neplugita pro manko de bovo. Kaj apenaŭ pasis du jaroj post la agrara reformo, iuj el la malriĉaj kaj subaj mezkamparanoj denove havis ŝuldon kaj iuj eĉ devis forvendi sian teron. Ekzemple, malriĉa kamparano Van Ŝaŭfeng, kiu estis devigita forvendi 13 arojn el sia tero kiun li ricevis dum la agrara reformo.

Ekde 1951, sub la gvido de la popola registaro ni organizis nin en interhelpajn grupojn, kaj poste en elementajn agrikulturajn produktokooprativojn kaj pli poste en la altgradajn agrikulturajn produktokooprativojn. La produktado komencis progresi paŝon post paŝo kaj ankaŭ nia vivo fariĝis iom post iom pli bona. Rilate al la luktoj kontraŭ naturaj katastrofoj, kiam ni organiziĝis en interhelpan grupon, ni tre bone disvolvis la efikecon de la akvoleviloj kaj altigis nian rezistan forton. Post la stariĝo de la elementa kooperativo, ni havis 5 ferajn noriojn movatajn per bovoj kiuj ankoraŭ pli grandigis nian forton en akvumado kaj drenado. Kaj du jarojn post la stariĝo de la altgrada kooperativo ni jam aĉetis 4 pumpmaŝinojn, sekve nia forto en batalo kontraŭ sekegeco kaj inundo des pli multe grandigis ol kiam ni estis ankoraŭ en la stadio de la elementa kooperativo.

Tamen nek la interhelpa grupo nek la kooperativo povis plene kontentigi nian deziron de plia disvolvo de la produktado kaj levo de la vivnivelo. Ekzemple dum la stadio de la kooperativo ni tre deziris planti pli da du-rikoltaĵ rizo por kreskigi la produktokvanton de greno. Sed tion ni ne kuraĝis fari tiutempe, ĉar la kooperativo estis malgranda kaj la kampoj estis tre dise lokitaj. Kampoj de apudaj kooperativoj estis interlokitaj senorde kaj ne eblis laŭplane fosi

** 1 juano = ĉ. 4.5 steloj.

† Kies kreskado okupas malpli longan periodon ol tiu de la ordinara kaj tio ebligas alian rizrikolton en la sama jaro.

La Novaj Domoj de l' Komunumo

Lernad' en Nokto



Salikoj junaj vice prosperas,
Sub ili domoj novaj aperas.
La arboj heĝe ĉirkaŭ-borderas.


Fenestroj verdas, ruĝas tegoloj,
Kaj l' ĉambroj plenas je suna oro —
Ho, bela bild' en riĉaj koloroj.

Knabinoj iras al kamplaboro,
Tra l' branĉoj vidas ĝin kun scivolo.
Mallaŭte sonas jena parolo:

“Por kies loĝo la domoj pretas?
Eĉ kuirejojn ili posedas,
Fenestroj vitraj brilojn disjetas.”

Ekridas la estro komunuma:
“Feliĉas la junularo nuna —
Por via loĝ' kun novedzo juna.”

Jen la knabinoj
honte ekkuras,
Iliaj vestoj gaje
susuras,
Kaj l' kampojn ili
bunte tinkturas.



Mallongas marta nokto sudĉinia.
Ja kiu volus enlitiĝi frue?
Post la pendig' de l' sarkilaro nia,
Stratetoj ekmurmuras iom brue.

Trans la ŝtonponton, tra l' saliknebul' ni iras.
Ĉe l' svingiĝantaj persikbranĉoj brilas jen lamp-
lumoj.

La vasta lernejpord' bonvenon diras
Al lernant-membroj de la komunumo.

Ekstervilaĝe rivertajdo plaŭdas,
Kaj vilaĝfine legaj voĉoj laŭtas.
Enlibren profundigaĝas ĉies koro
Samkiel terplugiloj kun fervoro.

Por kiu ne mallongas marta nokto,
Se ĉiu novon lerni kor-deziras?
De kiam plenruĝiĝis la persikarb' ĉe l' pordo?
La lun' jam okcidenten forŝteliras.

VERKIS JAN ĈEN
TRAD. LAŬLUM

kanaletojn por solvi la irigacian problemon. Ekzemple en 1956 kaj 1957 ĉe ni okazis sekegeco dum la somero kaj aŭtuno kaj la tiama altgrada agrikultura produktokooparativo “la Unua de Aŭgusto” posedis entute pli ol 200 hektarojn da irigaciataj kampoj, el kiuj 100 hektaroj estis priplantitaj per rizo durikolta, sed pro nesufiĉo de irigaciaj rimedoj kaj manko de laborfortoj, parto de la kampoj restis senrikolta. En somero de 1958 ni plantis en pli ol 130 hektaroj da kampoj la malfruan durikoltan rizon, kaj okazis ankaŭ serioza sekegeco kaj la plantidoj estis rimarkeble velkantaj pro manko de akvo. Kvankam niaj kampoj situas nur 4 kilometrojn for de la rivero Fuhe sed kiamaniere ni alkonduku la akvon el la rivero? Ĉu konstrui transriveran barajon? Sed eĉ duona monato ne sufiĉus, eĉ se ni sendus ĉiujn niajn homojn al la konstrulaboro. Ni poste interligiĝis kun la najbaraj kooperativoj kaj ni sukcesis finkonstrui la barajon nur en sep tagoj kaj dank' al tio la plantidoj estis savitaj.

Ni kamparanoj estas ĉiuj konvinkitaj el nia propra sperto ke unuiĝo estas potenca forto. Sekve en aŭgusto de 1958 la 12 altgradaj agrikulturaj produk-

tokooperativoj unuiĝis en la popolan komunumon “la Unua de Aŭgusto”.

KIEL VENKI LA KATASTROFOJN?

La katastrofoj de inundo kaj sekegeco ambaŭ estas grandaj malamikoj de la agrikultura produktado. Jam delonge niaj prapatroj deziris ilin subigi, sed ne sukcesis. Nur post la stariĝo de la komunumo, kiam ni povis konstrui la irigacian sistemon sur la ebenajo inter la riveroj Fuhe kaj Gangiang, ŝanĝiĝis la antaŭa stato de “sekeco post tri suntagoj kaj inundo post tri pluvtagoj”. La konstruado de tiel giganta akvoutiliga sistemo estas nerealigebla sen la potenco de kolektiva ekonomio de popola komunumo.

Ekzemple, nia agrikultura produktokooparativo Lianhi posedis entute nur 13 hektarojn da tero, kies tuta areo eĉ ne sufiĉus por la irigaciaj kanaloj mem. Nur post la starigo de la popola komunumo, dank' al la kolektiva forto de la komunumo kaj sub la potenca subteno de la registaro, oni povis glate efektiviĝi la projekton kaj solvi la bezonon de kampoj por fosado de la kanaloj.

ĈION VENKAS LA KOLEKTIVA FORTO

En la vintro de 1958 kaj printempo de 1959, dank' al la kolektiva forto de la komunumo, ni entreprenis grandskale akvoutiligan konstruadon kaj fosis entute 13 kanalojn kun variaj larĝecoj kun totala longo de 25 kilometroj por enkonduki akvon el la rivero. Je unu fojo oni solvis la irigacian problemon por pli ol 470 hektaroj da kampoj, kiuj estis facile damaĝeblaj de sekeco kaj inundo, sen bezono de iaj ajn akvoleviloj.

Kun pli multaj laborantoj kaj pli grandaj fortoj, la popola komunumo disvastigis sian sferon de entreprenado. La komunumo kaj la produktaj brigadoj establis fabrikojn de kalko, de agrikulturaj instrumentoj kaj de brikoj. Tio multe kreskigis la komunan akumulon, kaj sekve pli da kapitalo estis disponebla por aĉeti agrikulturajn maŝinojn. De 1959 ĝis 1961 la komunumo elspezis pli ol 270,000 juanojn el la komuna fonduso por aĉeti traktorojn, elektrajn pumpilojn kaj aliajn agrikulturajn instrumentojn.

Nun, la komunumo jam posedas 6 traktorojn, 55 elektrajn pumpilojn, 10 dizelajn pumpilojn, 33 draŝilojn, 13 elektrajn senseligilojn de rizo kaj aliajn maŝinojn. Per tiuj maŝinoj ni do realigis la mekanikigon de irigaciado kaj drenado kaj partan mekanikigon de terkulturado kaj de prilaborado kaj transportado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj.

Kvankam la agrikulturaj maŝinoj, kiujn ni posedas, estas ankoraŭ ne multaj, tamen ili ludis por ni vere grandan rolon. En 1953 dum la tempo de kooperativo, okazis ĉe ni sekegeco dum la daŭro de 60-70 tagoj. Tiam nia kooperativo, mobilizis nian tutan laborkapablan membraron el pli ol 600 homoj kaj uzis ĉiujn disponatajn instrumentojn, por lukti kontraŭ la sekegeco. Post malfacila sed sensanceliĝa batalado ni fine venkis ĝin kaj garantiis la bonan rikolton de la malfrua rizo. Sed, en 1962 kiam okazis alia sekegeco dum la daŭro de pli ol 80 tagoj, nur pli ol dek personoj el ni sin okupis por lukti kontraŭ la sekegeco, dum la ceteraj povis tute senĝene fari siajn proprajn laborojn. Fine la sekegeco estis same venkita. Ĉar

la arkaikaj akvoleviloj jam estis anstataŭitaj per elektraj pumpiloj.

La utiligo de tiaj modernaj maŝinoj, kiaj la traktoroj kaj elektraj pumpiloj, estis nebla ne nur en la tempo de individua mastrumado, sed ankaŭ en la tempoj de elementa kaj altgrada kooperativoj. En la tempo de individua mastrumado, oni havis nur dise lokitajn kampojn kun suma areo de kelke aŭ dekoj da mu-oj respektive, kiel ili povis utiligi tiajn maŝinojn? Kaj poste en la tempoj de kooperativoj, la areo de la tero estis pligranda. Por ĝin kulturi sufiĉis jam unu aŭ du traktoroj. Sed, ĉu estas inde establi riparejon por tiuj unu aŭ du traktoroj? Tiukaze se okazas difektiĝo, traktoro fariĝos nepre senutilaĵo. Ofta venigo de riparisto postulas tro grandan pagon. Cetere, tiaj maŝinoj ĝenerale kostas almenaŭ kelk mil aŭ eĉ dek mil juanojn. Kiu unuopulo havas monon por ilin aĉeti?

La sekegeco en 1963 estis precipe serioza. Tiam la akvonivelo en la ĉefaj kanaloj sur la ebenaĵo estis tre malalta, kaj pro tio la akvo ne povis flui en la branĉajn kanaletojn de nia komunumo. La printempaj plugado kaj semado estis minacataj. La situacio estis tre serioza. Tiam la komunumo tuj elspezis pli ol dek mil juanojn por aĉeti sep pli potencajn elektrajn pumpilojn, pumpis akvon en la branĉajn kanaletojn kaj solvis la akvoprovizon dum la printempaj plugado, semado kaj kreskigo de rizplantiĝoj por ĉiuj produktaj brigadoj, tiel ke oni sukcese transplantis la fruajn rizplantiĝojn. Kvankam ankaŭ la somera sekegeco estis tre serioza, sed neniun tagon mankis akvo en ĉiuj rizkampoj. La kaŭzon de la senprecedenca abunda rikolto de la frua kaj meza rizoj en tiu jaro la komunumanoj unuanime atribuis al la popola komunumo.

Mi neniel intencas konkludi, ke nun ĉe nia popola komunumo "la Unua de Aŭgusto" ĉiuj problemoj estas jam tute solvitaj. Forpasis nur 5 jaroj post la stariĝo de nia komunumo kaj kompreneble restas ĉe ni multe da aferoj farendaj, pri kiuj ni ankoraŭ devas nin okupi.

* KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

ĈEFMINISTRO ĜOŬ ENLAJ VIZITAS AMIKAJN LANDOJN

Kun deziroj profundigi la amikan interkomprenon de Ĉinio kun la afrikaj kaj aliaj aziaj landoj, kaj pliintimigi la tradician amikecon inter la ĉina kaj afrikaj kaj aziaj popoloj por pluapase disvolvi la amikajn interrilatojn en la kunlaborado, la ĉefministro de la Ĉina Popola Respubliko ĜoŬ Enlaj kaj vicĉefministro kaj

ministro de eksterlandaj aferoj Ĉen Ji faris ekde la 14-a de dec., 1963 ĝis la 1-a de feb., 1964 vizitojn al la amikaj landoj: la Unuiĝinta Araba Respubliko, Aĝerio, Maroko, Tunizio, Ganao, Malio, Gvineo, Sudano, Etiopio kaj Somalio en Afriko, kie ili estis varme akceptataj per solenaj bonvenigoj de iliaj ŝtataj gvidantoj kaj popoloj.

La invitojn al vizito de Tanganjiko, Kenio, Ugando, Zanzibaro kaj Burundo ili volonte akceptis,

sed la dato de la vizito prokrastiĝos ĝis tempo konvena al ambaŭ flankoj.

Ĉefministro ĜoŬ kaj la vicĉefministro Ĉen ankaŭ vizitis Albanion komence de jan. kaj tie pasigis la Novjaran Tagon kune kun ĝia popolo en tre gaja atmosfero.

Reveninte de Afriko, ili vizitis ekde la 14a de feb., 1964 la aziajn amikajn landojn Birmo, Pakistano kaj Cejlono.

En la "Malriĉa Montvalo"

ELIRINTE el la urbo Longhi, Fugian-provinco, post dek lioj da irado okcidenten, ni venas al la popola komunumo "Unuiĝo" de Longhi-gubernio. Ambaŭflanke de la vojo estas bluverdaj montoj kaj dense staras pinoj, cedroj ĉielkovrantaj. Sur riverbordo staras amasoj da lignopecoj, kaj en la rivero naĝas laŭflue lignoflosoj kiel vagonaro. Sur la ŝoseo kuras tien kaj ĉi tien aŭtoj plensarĝitaj per bambuoj, kemisterkoj, agrokulturaj instrumentoj kaj medikamentoj. Ambaŭflanke de la ŝoseo altensiaj kaj malaltensiaj elektraj fadenoj zumadas en vento el la montvalo. La novaj domoj, terasformaj kampoj kun rizaromo prezentas belan bildon de la nova kamparo.

Kiu povas kredi, ke antaŭ nur 14 jaroj, ĉi tie estis nur malriĉa montvalo kun malofta trafiko, nekultivataj kampoj kaj al la kamparanoj tieaj mankis manĝaĵo kaj vesto? Antaŭ la Liberiĝo, ĉi tie 90% de la kamparo kaj du trionojn de la arbaroj posedis kvindek kelkaj bienuloj kaj la kamparanoj vivis tre mizere pro pezaj lupago kaj uzuro. Kiam okazis katastrofo de inundo aŭ trosekeco, multe da homoj devis forfuĝi de sia hejmloko kaj vivteni sin per almozpetado.

Post la Liberiĝo, la kamparanoj renversis la bienulan klason kaj ricevis kampojn, domojn kaj agrokulturajn instrumentojn. Sekve de la fondiĝo de la interhelpaj grupoj, elementaj kaj altgradaj agrokul-

turaj kooperativoj kaj la popola komunumo, la produktivo altiĝis paŝon post paŝo. Respondeculo de la popola komunumo diris al ni, ke depost la fondiĝo de la popola komunumo, tre rapide disvolviĝis la produktaj senescepte de agrokulturo, forstokulturo, bestobredado, fiŝbredado kaj flankokupoj. La totala produktokvanto de greno de la tuta komunumo en 1962 estis 1,250,000 k. g. kaj la meznombra produktokvanto po muo* estis 204 k. g., t. e. 78.4-elcenta pliiĝo kompare kun tiu de 1949 kaj 30.3-elcenta pliiĝo kompare kun tiu de 1957. La enspezo de forstokulturo kaj flankokupoj atingis 25,400 juanojn**, kiu estas 6.94-oble pli multe ol tiu de 1949 kaj 1.66-oble pli multe ol tiu de 1957. Je la fino de la pasinta sept., la porkoj en la bredejoj de la popola komunumo nombriĝis pli ol 810, kaj estis 1.16-oble pli multe ol tiu en 1949 kaj 75% pli multe ol tiu en 1957.

Kun la disvolviĝo de la kolektiva ekonomio, multe pli boniĝis ankaŭ la vivo de la komunumanoj. Ni faris detalan enketon en la kvin brigadoj de la popola komunumo. La rezulto de la enketo montris al ni, ke en tiu komunumo el pli ol 800 familioj kun pli ol 3,600 personoj, la meznombra grenporcio po homo en

* 1 muo = 1/15 hektaro

** 1 juano = ĉ. 4.5 steloj

* KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

LA ĈINA POPOLO FIRME SUBTENAS PANAMON

La 9an de jan. la panama popolo faris grandan manifestacion por oponi la usonan agreson kaj defendi sian ŝtatan suverenecon. Ĝiaj partoprenantoj estis masakritaj de la usonaj agresantoj. Tiu ĉi akcidento indignigis la ĉinan popolon.

La 12an de jan. prezidanto Maŭ Zedong faris parolon esprimante la volon de la ĉina popolo, ke ĝi tutforte subtenas la justan lukton de la panamanoj kontraŭ la usonaj agresantoj kaj ilian postulon por reakiri sian suverenan rajton de la kanala regiono, kaj li alvokante, ke la tutmonda popolo unuiĝu kaj organiziĝu en la plej vasta unuecfronto por kontraŭbatali la

agreson kaj militan politikojn de la usona imperiismo kaj por la defendo de la mondopaco. Ankaŭ prezidanto Liu Ŝaŭki, ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj ĉefkomitatano Ĝu De aparte sendis telegramojn al la ŝtata kaj parlamenta prezidantoj de la Respubliko de Panamo, esprimante firman subtenon al la justa batalo de la patriotaj panamanoj.

En la sinsekvaj 8 tagoj antaŭ la 20a de jan., ĉiuj urboj kaj urbetoj de Ĉinio, eĉ tiuj sin trovas fore de la landa centro, havis mitingojn kaj manifestaciojn protestante kontraŭ la usona agreso en Panamo. La popolamaso en tiuj kunagadoj nombriĝis jam pli ol 16,000,000 personoj. La ĉina popolo kredas, ke la panama popolo certe realigos sian deziron finfine.

NOVA ĜOJO SUR INTERN- MONGOLIA STEPO



En lasta unu jaro en Interna Mongolio, la plej granda brutbreda regiono de Ĉinio, pli ol 10,000,000 junaj brutoj estas kreskigitaj, kaj pli ol 230,000 staloj estas konstruitaj. Tio estas cifero neniam atingita antaŭe en Interna Mongolio.

La senprecedenca prospero ŝuldas al la fondiĝo de popolaj komunumoj, kio ebligis laŭplanan utiligon de la tuta stepo kaj efektivigon de multaj paŝoj por protekti la brutojn, multigi la brutidojn kaj alporti akvon al la vasta akvomanka stepo. En la kvin jaroj de 1959-1963 estis nove fositaj aŭ riparitaj sume pli ol 28,000 putoj. Dank' al tio, pli ol 30,000

Ĉen Ĉenglie (meze) kaj liaj plej aĝa filo Ĉen Joušui, tria filo Ĉen Jouĵan (dekstre) kaj nepeto vidataj post la Liberiĝo.

Fotoj de Liu Gie

Jen la kontrakto per kiu Ĉen Ĉenglie vendis sian filon antaŭ la Liberiĝo pro manko de vivrimedo.



1949 estis nur 150 k. g., sed en 1957 ĝi altiĝis ĝis 240 k. g., kaj en 1962 ĝi plialtiĝis ĝis 280 k. g. La meznombra viandporcio po homo en 1962 estis 1/2 pli multe ol tiu en 1957 kaj 3 1/2-oble pli multe ol tiu en 1949. Por vestado, ĉiu havis en 1949 nur 1 aŭ 2 kompletojn da sensubŝtofaj vestoj, meznombre; sed nun jam 4 aŭ 6 kompletojn. En 1949, ĉiu trio de homoj havis nur unu vatitan litkovrilon eluzitan, kaj pli ol 80% de la loĝantoj malhavis moskitvualon; sed nun, ĉiu trio de homoj havas du vatkovrilojn kaj ĉiu duo da homoj

havas unu moskitvualon. Estis pli mizere en loĝado dum la pasinteco. En 1949, el la kamparanaj familioj 10% ne havis domon, kaj 37% loĝis en kadukaj aŭ pajlsegmentaj kabanoj. Kaj tiuj kiuj havis loĝejon, loĝis tre interpremiĝe: en unu ĉambro loĝis meznombre tri homoj. Sed post la Liberiĝo, duono de la kamparanaj familioj konstruigis por si novan domon kaj nun ĉiuj familioj havas sian propran domon kaj por ĉiu homo estas meznombre unu ĉambro.

* KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

kvadrataj kilometroj de la stepo ricevas sufiĉan akvon kaj multaj kadukiĝintaj paŝtejoj reakiris sian junecon.

GRANDTIPA TORNILO PRODUKTITA EN ĈINIO

En malnova Ĉinio, nenia tornilo produktiĝis. Sed nun ni havas eĉ grandtipajn tornilojn enlande fabrikatajn. Ĉe la fino de la lasta jaro la Fabriko de Pezaj Ilmaŝinoj de Vuhan, la ĉefurbo de Hubej-provinco, donis sian novan produkton de grandtipa vertikala tornilo, kiu povas prilabori grandajn maŝinpecojn kun diametro de 6.3 metroj. La maŝino pezas pli ol 200 tunojn kaj ĝia alteco atingas naŭ metrojn. Ĝi estas il-maŝino telemanipulata.

PLI OL MIL SPECOJ DE TEKSAĴOJ

Pekino jam ne plu estas urbo de konsumado, kiel ĝi estis antaŭ la Liberiĝo, sed fariĝis industria urbo produktanta multajn ĉiutagajn necesojn. La produkto nur de diversaj teksaĵoj en la lasta jaro jam superis mil specojn.

20 MIL IRIGACIAJ KONSTRUOJ EN HUNAN-PROVINCO

Multaj regionoj de Hunan-provinco estas montozaj. La irigacio ludas tre gravan rolon en la agrikulturo de tiu provinco. Krom grandigi la konstruitajn akvoverzejoj kaj laĝetojn, la popolaj komunumoj en Hunan komencis en lasta vintro konstrui grand-

nombre malpli grandajn irigaciajn konstruaĵojn, ekzemple kondukajn kanalojn, transriverajn barojn ktp. Ĝis la mezo de la lasta novembro estis finitaj jam pli ol 19,000 tiaj konstruoj. Tio plibonigos la irigacion kaj ampleksigos ĝian utiligon.

GAZETO POR KAMPARAJ GEJUNULOJ

Antaŭ nelonge komencis eldoniĝi en Ŝanhajo nova monata gazeto *Kamparaj Intelektaj Gejunuloj*. Ĝi celas helpi ĉefe la junajn intelektulojn, kiuj revenis al la kamparo por partopreni la agrikulturajn laborojn. La enhavo de tiu ĉi gazeto estas sinteza por konigi al la gejunuloj diversajn necesajn sciojn.

Ni ankaŭ vizitis kelkajn familiojn de komunumanoj kaj iom informiĝis pri ilia vivo antaŭ kaj post la Liberiĝo. Komunumano Ĉen Ĉenglie, malriĉa kamparano de Guanglin-brigado kultivadis 15 muojn da luitaj kampoj antaŭ la Liberiĝo. Post pago de la lukosto kaj uzuro, restis al li jam preskaŭ nenio el la rikoltaĵoj, kaj li devis sin vivteni per manĝeblaj herboj kaj forvendi unu el siaj infanoj. Nun, li havas familion kun kvin membroj kaj en 1962 ĉiu el ili gajnis meznombre 326 k. g. da greno kaj 204 juanojn en kontanta mono. En la pasinta jaro li eĉ aĉetis novan biciklon por sia dua filo. Komunumano Vej Juking, malriĉa kamparano de alia brigado, antaŭ la Liberiĝo vivtenis sin per brulligno-kolektado. Ĉiutage per la akirita brulligno li povis gajni nur 0.45 k. g. da rizo kaj lia familio kun ses membroj vivtenis sin nur per tio. Se estis pluvtago, ili do devis malsategi. Nun liaj familianoj restas la samaj el kiuj nur unu estas laborkapabla. Kvankam ĉe li estas malmulte da laborfortoj kaj granda familio por subteni, lia familia vivo ne estas tiel bona kiel tiu de la najbaroj, tamen en 1962, tiu familio ricevis 1517 k. g. da grenoj kaj 629 juanojn en kontanta mono. Nun ĉe li estas bredataj du porkoj, dekelkaj kokoj, anasoj kaj kunikloj.

Laŭ la larĝa ŝoseo ni iris por fari viziton al la lernejo kaj sanitarujo de la komunumo. Survoje, respondeculo de la komunumo faris al ni multe da interesaj rakontoj. Li diris, ke antaŭ la Liberiĝo ĉi tie estis nenia aŭtovojo nek larĝa ŝoseo, tiam estis nur zigzagaj vojetoj krutaj kaj mallarĝaj. Foje en 1911 iu gubernatoro trapasis tie ĉi rajdante sur ĉevalo, kaj li falis kune kun la ĉevalo en abismon de la montvalo. Pro la trafikala malfacilo, eĉ salo kaj alumeto estis apenaŭ aĉeteblaj. Ekz. antaŭ la Liberiĝo, por unu skatoleto da alumeto, oni devis pagi intersanĝe unu

kg. da rizo. Multe da kamparanoj ne povis aĉeti alumeton kaj devis konservi iom da fajro post pretigo de manĝaĵo por bezono de la sekvanta manĝopreparo. Se la fajro estingiĝis, ili devis iri al najbaro por peti fajron per bambulameno.

Kiam ni vizitis unu lernejon, emocie diris iu maljuna instruisto, ke estis ege malofte antaŭ la Liberiĝo por infano de kamparano fini la lernadon de elementa lernejo. Tiam 90 elcentoj de la lernantoj en lernejo estis gefiloj de bienuloj aŭ riĉkamparanoj, kaj la nombro de lernantoj ne superis 100. Sed nun pli ol 85% de la geknaboj, kiuj atingis la lernaĝon, povas viziti lernejon. La lernejoj nun jam nombriĝas 580 kaj krome, estas 112 mezlernejoj kaj 3 universitataj studentoj en la komunumo.

La membroj de la komunumo ĉiuj estas viglaj kaj fortikaj kompare kun la stato antaŭ la Liberiĝo, ankaŭ tio estas grandioza ŝanĝiĝo. Antaŭe 80% el la loĝantoj suferis malarion kaj 20% suferis lienmalsanon. Tial estis tiam proverbo inter la popolanoj: Kiam la rizospikoj flavas, malsanulojn la ŝtoj havas. Tio estis viveca priskribo de la tiama sanstato de kamparanoj. Sed post la Liberiĝo estis fonditaj tie ĉi du kuracejoj, kaj en 1958 la popola komunumo establis ankaŭ sanitarejon kaj ĉiu brigado ekhavis sian sanitarstacion. Post multjaraj laboroj de prevento kaj elimino de malsano, nun jam ĝenerale malaperis malario, lienmalsano, kaj sangfilarioso (*filariasis sanguinis*), kiuj estis tre oftaj antaŭ la Liberiĝo.

Kiam ni finis la viziton kaj estis forirontaj, la kadroj kaj membroj de la komunumo sin okupis pri kampanjo kontraŭ malutilaj insektoj kaj sovaĝaj bestoj, por forstigado kaj ekspluatado de montoj. Ili klopodas krei por si pli belan estontecon per sia diligenta laboro.

La malriĉa kamparano Vej Juking de la produkta brigado "Unuiĝo" kaj liaj prapatroj en 3 generacioj uzadis tiun ĉi moskitovualon dum 60 jaroj antaŭ la Liberiĝo.
Foto de Liu Gie



Vej Juking kaj liaj gefiloj vidataj nuntempe.

Foto de Liu Gie





Matene ĉe la legombazaro de Urumĉi-strato en Ŝanhajo.

Foto de Gu Dehua

SAME kiel la nacia ekonomio, la merkato en Ĉinio fariĝas pli kaj pli bonstata en la lastaj jaroj, kaj prospero regas la tutan merkaton. La kerno de la tuta merkato, tiu de la greno daŭre restas stabila, kun garantio de sufiĉa provizo.

Sur la fundamento de kreskado de la grenprodukto ankaŭ la kondiĉoj de provizado de aliaj agrikulturaj produktajoj multe pliboniĝas, precipe de la t. n. flankaj manĝaĵoj. La kvanto de provizita porkaĵo en la ok urboj, nome: Pekino, Ŝanhajo, Tiangin, Kantono, Vuhan, Ŝenjang, Hi-an, Ĉongking, dum la periodo de januaro ĝis aŭgusto lastjare estis 2.2-oble pli multa ol tiu dum la sama periodo en la jaro antaŭlasta. Pli-multiĝis la provizo de ovoj preskaŭ 3-oble. La legomoj kaj akvaj produktoj en variaj specoj, bonaj kvalitoj kaj malaltaj prezoj, estas tute sufiĉaj por libera elekto kaj aĉetado de la klientoj. En 1962 la legomoj estis jam senmanke liverataj al la merkato, estas pli abunde nuntempe. Dum la abunda sezono en Pekino pli ol 3,000,000 kg. da tomatoj meznombro estis forvenditaj ĉiutage. La prezoj de legomoj estas malaltaj. Ofte per 10 cendoj (ĉ. 4½ kopekoj aŭ US\$ 0.05) mastrino povas aĉeti plenan korbon da freŝaj legomoj. En la grandaj ŝtataj vendejoj de flankaj manĝaĵoj en la grandaj urboj kiel Ŝanhajo, Pekino, Vuhan, Kantono, Ĉongking, ktp. ĉiam estas pli ol mil specoj de




Granda nombro da elektraj motoroj estas produktitaj por subteni la agrikulturon.

Foto de Ĝang Ŝenming

Elektraj maŝinoj fabrikitaj de la Ŝanhaja Elektromotora Fabriko por uzo en akvoutiliga konstruado.

Foto de Zuo Ĝiaĝong

90-milimetraj plastaj tuboj fabrikitaj de la Ŝanhaja Kemia Fabriko por konduki akvon el profundaj putoj en la kamparo.



en Prospero

varoj por la libera elekto de la konsumantoj. La loĝantoj povas aĉeti ne nur freŝajn porkaĵojn, bovaĵojn, ŝafajojn, kokojn, anasojn, ovojn, sed ankaŭ multajn famajn specialajn produktojn el diversaj lokoj de la lando, ekzemple, la ŝinkoj el Ĝinhua, peklitaj anasoj el Nankino, holoturioj, ktp.

Samtempe kun la pliboniĝo de provizado de agrikulturaj produktoj, ankaŭ la merkato de industrie produktitaj konsumajoj multe pliboniĝas. La produktoj de malpezaj industrioj kun industria produktoj kaj minajoj kiel materialoj havas pli grandan kreskon, kaj la kvanto de novaj produktoj multe pliiĝis ol en la pasintaj jaroj, ekz. plastaj, sintezfibraj objektoj, ktp. Ankaŭ tiuj industrioj kiuj uzas agrikulturajn produktojn kiel materialojn multe pliproduktis. Prenu la produktvaloron de 17 specoj de produktoj de la lasta kategorio kiel ekzemplon, dum la unua duono de la lasta jaro ĝi pliiĝis je 20% ol tiu en la jaro antaŭlasta. Samtempe la kvalito de industria produktoj bone progresis kaj ankaŭ la varspecoj plimultiĝis. En grandaj ĉiovendejoj nun varoj de dudek ĝis tridek mil specoj estas vendataj, kaj en multaj malpli grandaj magazenoj la varspecoj plimultiĝis je kelkcent ĝis kelkmil. Novaj produktoj estas senĉese liverataj al ĉiuj lokoj de la lando. La novaj specoj de plastaj objektoj estas tre ŝatataj de la konsumantoj.

Multe kreskis la provizado de urbaj industriaj produktoj al la kamparoj. Antaŭ ĉio grave plimultiĝis la provizado de agrikulturaj produktorimedoj. Ekzemple, la ĥemisterko liverita dum la unua duono de la lasta jaro plimultiĝis je 42% kompare kun tiu dum la sama periodo de la jaro antaŭlasta. La pum-piloj por irigacio kaj drenado pliiĝis pli ol unuoble. Plimultiĝis ankaŭ elektraj transsendaj kaj transformaj ekipaĵoj, motoroj por irigacio kaj drenado, puŝĉaroj kaj bestotirataj ŝarĝveturiloj kun pneŭmatikoj, kaj torniloj por riparejoj de agrikulturaj maŝinoj en la kamparo, ktp.

Ankaŭ la provizado de vivbezonaĵoj al la kamparo pliboniĝis. Ekz. diversspecaj ŝuoj liveritaj al la kamparo dum 1962 preskaŭ duobliĝis en komparo kun tiu en la jaro 1957, kaj dum 1963 ankoraŭ pli multiĝis. Emajlaj trinkvazoj venditaj al la kamparo dum la periodo de januaro ĝis julio, 1963 pliiĝis je 42.8% ol dum la sama periodo en 1962, ktp., ktp. La varieco de liveritaj industriaj produktoj, kaj ilia taŭgeco por kamparana bezono tre kontentigas la popol-komunumanojn.




La kresko de la kvanto de varoj aĉetitaj kaj venditaj de la ŝtato kaj la pliriĉiĝo de la stokoj de ŝtataj kaj kooperativaj vendejoj, la stabileco de la prezoj kaj la plia ekspansio de cirkulado de varoj, la plua disvolviĝo de unuigita merkato de socialismo kaj plifirmiĝo kaj pliprospiro de la socialisma komerco — jen estas la tuta fizionomio de la merkato en nuna Ĉinio.

La Ŝanhaja Trikota Fabriko pretigas diversspecajn vestaĵojn en variaj koloroj kaj desegnoj por la kamparanoj.

Foto de Jang Putaŭ

Enkestigitaj ĉiutagaj bezonaĵoj fabrikitaj en Ŝanhajo estas enŝipigitaj por transporti en vilaĝojn.

Foto de Jang Putaŭ



Ĉinio Faris Grandiozan Aferon

(La subtitoloj en la artikolo estas niaj — la Red.)

LA TRIA VIZITO AL ĈINIO

Mi restis en la Nord-oriento de Ĉinio kvar tagojn. Mi pli ŝatus nomi tiun regionon la “koro” de nuntempa Ĉinio. Parolante pri la Nord-oriento de Ĉinio, mi kvazaŭ profunde enspiras plenan pulmon da freŝa aero. Kiam mi alvenis al la loko, la vetero estis treege malvarma, sed la kamentubegoj starantaj tie kvazaŭ arbaro vekis en mi vervon. Mi sopiras al tia spektaklo, ĉar ĝi prezentas al ni luman perspektivon. Mi ne povas ne esprimi mian elkoran estimon al la tiea konstruado de industria fundamento. Tieaj arbaroj jam transformiĝis en kamentubegojn supren leviĝantajn ĝis nuboj. Iliaj suproj ofte kaŝas sin en la malvarma nebulo de frua aŭtuno.

Tiu ĉi estis la tria fojo de mia vizito al tiu fierinda regiono de la ĉina popolo. Mi ne enuiĝus, eĉ se mi vizitus ĝin por kelkdek fojoj. Ĉar ĉiufoje mi vidis senescepte ĝian novan fizionomion. Ne nur la urboj kaj vilaĝoj montris al ni sian novan vizaĝon, sed ankaŭ la laboruloj, terkulturistoj kaj geknaboj prezentis sin kun nova fizionomio.

Ĉinio entreprenas grandiozan aferon — eĉ la plej grandiozan aferon en la homa historio. La malamikoj de Ĉinio tiun grandiozan aferon rigardas kun maltrankvilo. Sed la amikoj de Ĉinio tamen rigardas ĝin kiel grandan entreprenon, kiu donas esperon al la homaro.

Ĉar, se ĉi tiu granda entrepreno prosperos al Ĉinio, ĝiaj malamikoj povos fari definitive nenion. Prezidanto Sukarno diris: “Ni, la indonezia nacio, ne sole estas amiko, sed ankaŭ kunbatalanto de Ĉinio.”

Ĉe pritakso de la afero de la amiko, nenio estas pli konvena ol pozitiva konfirmo pri la frukto de ĝia revolucio.

NOVA ĜARDENO KUN MILKOLORAJ FLOROJ


La enhavo de tia batala karaktero en la organizo de la ĉina popolo povas nur veki en mi admiron. Strikte organizita kaj armita per tre bona teorio, ĝi estas senkompara forto. El la historio de Ĉinio pri la lastaj jardekoj, oni povas rimarki, ke en la komenco la Komunista Partio de Ĉinio estis nur grupeto, sed finfine ĝi komplete ŝanĝis la fizionomion kaj karakteron de la lando. Kiam Maŭ Zedong gvidis tiun grupeton de ĉinaj komunistoj, dum KPĈ estis ankaŭ juna, kaj la komunisma movado en Ĉinio ankoraŭ malforta, li mem eldiris faman sentencon, kiu poste fariĝis realaĵo:

** Sadya Graha estas vic-ĉefredaktoro de la ĵurnalo “Suluh Indonesia” (Torĉo de Indonezio), kiu gvidis la delegacion de indoneziaj ĵurnalistoj viziti nian landon, de la lasta tagdeko de septembro ĝis la fino de oktobro pasintjare. Ĉi tiu artikolo aperis en la nomita ĵurnalo en la 31-a de oktobro 1963. Nia traduko estas iom mallongigita.*

Kemisterko produktita de la Fosforerca Fabriko de Kunming, Junnan-provinco estas transportota al la kamparo.

Foto de Guanĉan

Foiro kampara en Venhi-gubernio de



“Eĉ fajrero malgranda povas bruligi la stepon.” Hodjaŭ la “fajrero” preskaŭ forbruligis komplete la sovaĝejon de malnova Ĉinio. Hodiaŭ sur la bruligita sovaĝejo kreĝis nova ĝardeno kun milkoloraj floroj.

Antaŭ kelkdek jaroj estis nur kelkdeko de personoj, estis nur fajrero, sed fine Maŭ Zedong per ĝi bruligis la stepon. Hodiaŭ ili ne estas nur dekoj, sed sescent kvindek milionoj da personoj. La organizita ĉina popolo, ĉu tiam nur kun kelkdeko da personoj, ĉu nun kun kelkcent milionoj da personoj, estas ĉiam armita per batalspirita ideologio.

NE ESTAS PESIMISMO AŬ MALESPERO

Ĉinio kaj la ĉina popolo, strikte organizite kaj armite per bona ideologio, neniam sentis pesimismon aŭ malesperon pri sia estonteco. Ĉi tiu lando suferis gravajn naturajn katastrofojn dum tri sinsekvaj jaroj; iu alilando revokis el ĝi siajn specialistojn kaj ĉesigis la helpadon donatan al ĝi; kaj Usono trudas al ĝi blokadon. Tamen ĉio ĉi evidente ne povas malesperigi kaj subigi la ĉinan popolon. De 1962 ĝis 1963 la ĉinoj supervenkis la naturkatastrofojn, kaj nun mi propraokule vidis, ke pli ol antaŭe ili fidis sian propran forton, t.e. konvinkitaj, ke iliaj gvidantoj kaj iliaj organizado kaj ideologio estas ĝustaj.

Nun, post kiam la ĉina popolo vidis sian propran povon por supervenki ĉiujn malfacilaĵojn kaj rerigardas la gloran vojon trapasitan, ĝi ĉiam pli fidis al sia propra forto. Iliaj fabrikoj, de la ŝpinaj ĝis la ferŝtalaj, plene funkcias kaj la produktado reprosperiĝas. Iujn varojn, kiuj en la pasinteco devis esti importataj el alilando, oni jam povas mem fabriki.

Tial, kiu opinias ke politika kaj ekonomia izo'ado de Ĉinio povos renversi la Ĉinan Popolan Respublikon,

tiu faras eraron en sia kalkulo. Hodiaŭ mi klare vidas kaj plene konstatas, ke Ĉinio kaj la ĉina popolo estas jam harditaj pli firmaj kaj pli fortaj tra la senĉesa elprovado.

Ĉie boĵas fervoro de laboro, funkciadas la fabrikoj dum dudek kvar horoj ĉiutage, abundas manĝaĵoj en la bazaroj, tre diversaj estas la komercaĵoj en vendejoj de urboj kaj vilaĝoj, ĉio ĉi estas ja fakto, ne kaŝebla nek falsebla. Se mi kaŝus tiun fakton, mi trompus la denunan historion.

LA POPOLA KOMUNUMO

Mi estas bonŝanca, ĉar mi apartenas al la unua aro da indoneziaj ĵurnalistoj, kiuj en la komenco de 1959 konatiĝis kun la popola komunumo en ĝia “bebaĝo”. La propagando pri fiasko de la popola komunumo havis grandan influon en aliaj landoj. La respondo estas facila. Kiel ne? Kiel mi jam skribis supre, ĉiuj branĉoj de la ĉina agrikulturo nun dependas de la popola komunumo, sekve la demando de nutraĵoj de la ĉina popolo estas decidata tute de tiu ĉi revolucia sistemo.

Kiel statas nun la afero? Mi propraokule vidis, ke vendoplacoj de Ĉinio estas plenaj de agrokulturaj produktadoj, interalie legomoj, kokajo, kapraĵo, porkaĵo kaj bovaĵo. Se la popola komunumo estus jam malsukcesinta, la bazaroj montrus sin nepre malplenaj. Dank' al importoj? Ne eble! Estas afero absolute neebla, nutri kelkcent milionojn da loĝantoj per importitaj grenoj.

Mi ne nur vidis la abundecon de manĝaĵoj kaj iliajn malaltajn prezojn, sed ankaŭ rekte faris akrajn demandojn al la respondecaj funkciuloj de la popolaj komunumoj en Pekino kaj Kantono.

Ŝanĥi-provinco.

Foto de Hoŭbo

Angulo de Ĉaŭĵang-legombazaro en Pekino.

Foto de Li Ĉangjong



UNU VIDO PLI VALORAS OL CENT AŬDOJ

Efektive unu vido pli valoras ol cent aŭdoj. Kion mi aŭdis cent fojojn kaj vidis per miaj propraj okuloj plurfoje montris, ke la popola komunumo de Ĉinio jam eliminis la malsanon, kiun ĝi havis en sia infanaĝo.

Nun bonan rezulton jam donis la kuraĝa eksperimento ekfarita de Ĉinio en 1958. La ĉina popolo jam komencis rikolti siajn fruktojn, kiujn mi vidis ĉie de la urbo Fuŝun en la Nord-oriento de Ĉinio ĝis la urbo Foŝan en suda Ĉinio, en bazaroj, apud stratoj, en vendejoj. Mi vidis ke en restoracio svarmas klientoj, kiuj povas laŭplaĉe mendi manĝaĵojn laŭ menuo. Mi vidis, ke frumatene virinoj irintaj al vendoplaco por fari aĉetojn havas kun si mansakojn plenajn de aĉetitajoj. Ĉio ĉi neniel povas esti ŝajnigita, kaj estas ebla nur se la popola komunumo ne trafis malsukceson.

ĈU ESTAS DEVIGA LABORADO?

Tiuj, kiuj tenas la flagon de "Libero" en eksterlando, ĉiam demandas: Ĉu la popola komunumo ne praktikas devigan laboradon? Pri tio mi povas simple respondi: "Devigi terkulturistojn estus eble nur por unu aŭ duona tago, sed, por daŭro de kvin jaroj de 1958 ĝis nun ja estas tute neebla!" La historio atestas, ke perforte devigi terkulturistojn efikas fine nur kiel bruligo de meĉo al eksplodajo. Se efektive estus tia devigo al la terkulturistoj, kiel tio estus ebla ke ni sekure iris sur kampoj en malfrua nokto, sen protektado de eskorto? Foje mi veturis nokte per aŭtomobilo kun neniuj eskortanto al vilaĝo situanta 150 km. fore de la urbo Hangĝoŭ, trapasante milarĝajn tervojojn, vilaĝojn kaj kampojn. Ĉu eblas longa vojaĝo en vilaĝoj maltrankvilaj, manĝomankaj, subpremataj?

La paco kaj kvieto en foraj vilaĝoj multon diras. Kian pruvon oni ankoraŭ bezonas serĉi alian ol tiun el ĉi simpla fakto, tute konvinka?

GRANDA REVOLUCIO EN LA VIVO DE TERKULTURISTOJ


Mi opinias, ke la popola komunumo estas formo de interhelpe kaj kunlaboro, kun karaktero de batalo en sfero de agrikulturo, surbaze de la ĉinaj kondiĉoj. Ĝi estas por mi objekto, ne-ĝisfunde pristudebla eĉ dum mia tuta vivo. Ĝi estas granda revolucio ne sole en la vivo de ĉinaj terkulturistoj, sed ankaŭ en tiu de terkulturistoj en la mondo.

Ĉi tiu problemo estas efektive tre grava. Ĉar la popola komunumo aperis la unuan fojon sur nia terglobo kaj estas praktikata en Ĉinio, kie sin trovas triono de la terkulturistoj de la tuta mondo! Ĝi estas revolucio ne nur de Ĉinio mem, sed ankaŭ de la tutmondaj terkulturistoj. La popola komunumo kaŭzis gigantan ŝanĝigon en la vivo de terkulturistoj kaj, Ĉinio ja estas finfine lando agrokultura, tial okazis granda skuiĝo. La gvidantoj de Ĉinio havas kuraĝon, ili fidis al la vero kaj plenumis perfektan antaŭ-preparon, sekve ili kuraĝis fondi la popolajn komunumojn.

Hodiaŭ, la tero en la kamparo de Ĉinio jam efektive fariĝis "ruĝa". La popola komunumo aĝas kvin jarojn. Ĝi estas ankoraŭ juna, sed ĝi jam kuracis sian infanecan malsanon. Daŭre vivas ĉi tiu "bebo" — la popola komunumo. Kaj en Ĉinio ĝi havas rajton kaj fundamenton por sia vivo.

Tio estas fakto. La pomarboj, kiujn plantis la popola komunumo antaŭ kvin jaroj, nun jam estas rikoltataj je la unua fojo. La irigaciaj kanaloj, konstruitaj de miloj kaj centmiloj da komunumanoj, grandnombre estas jam kompletigitaj, kaj nun irigacias nove kulturitajn kampojn. La akvorezervejoj, konstruitaj de miloj kaj centmiloj da komunumanoj sub la slogano de "ostomordo de formikoj", elmontris sian grandegan potencon dum sekegeco.

La popola komunumo prenas sur sin ĉiujn taskojn en rilato al la popola vivo. Ĝi aranĝas la labor-



fortojn, faras produktajn planojn, respondecas pri administrado kaj organizas la kulturajn aktivadojn de la membroj. Unuvorte, la popola komunumo zorgas ĉiujn bezonojn de la popolo escepte de la eksterlandaj aferoj.

Ĝi estas granda revolucio en la kamparo de la tuta Ĉinio, ĝi rilatas kelkcent milionojn da terkulturistoj ĉinaj. Pripensu, kiel admirinda organizo ĝi estas.

ŜANGĤIGO OKAZIS ANKAŬ EN SPIRITO

Ĉi tiu moderna organizo, profunde penetrinta en la kamparon kaj la kamparanajn familiojn, ankaŭ faris revolucion en la spirito de la terkulturistoj. Estas kompleta mensogo la aserto ke la popola komunumo devigas siajn membrojn manĝi en komuna manĝejo. Ankaŭ kompleta mensogo estas la diro ke la membroj de la komunumo estas perforte apartigitaj de siaj infanoj kaj edzino. Fakte, post sia laboro ili ĉiuj estas kun siaj edzino kaj infanoj. Se ankaŭ la edzinoj partoprenas en laborado, ili ricevas egalan rekompencan, kiel la edzoj. Ili povas sendi siajn infanetojn en infanvartejon, kaj reporti ilin hejmen post la laboro. Se iuj virinoj konsideras la enspezon de sia edzo jam sufiĉa por la vivo kaj preferas mem resti hejme por dommastrumado, neniu ilin ĝenas.

La malamiko de la popola komunumo nomas ĝin militista barako. Jes, la kamparanoj siatempe estis mobilizitaj. Sed, ĉu devige? Ne, ne devige sed per metodo de persvado, por ke la kamparanoj konvinkigu ke la komunumo portos al ili bonon. Hodiaŭ, la fakto pravas ke la komunumo jam eltenis la plej severan provadon, ĝiaj radoj jam turniĝas, kaj turniĝadas tre glate tiel same, kiel fluas la akvo de la grandaj irigaciaj kanaloj, konstruitaj de la membroj mem, kiel kreskas la pomarboj kiuj ĉiujare floras en la printempo, kaj poste fruktas kaj donas rikolton.

LEGU KAJ POSEDU LA SCIOJN
POR PLI BONE KONI ĈINION

KONCIZA GEOGRAFIO

DE ĈINIO

PARTO I: Ĝeneralaj geografiaj priskriboj pri Ĉinio

PARTO II: Geografio laŭprovinca

6 MAPOJ kaj multaj ILUSTRAĴOJ estas aldonitaj

Formato: 13 × 18.5 cm., ĉ. 250 p.

Prezo (nedifinita): £0-4-9 US\$0.65

Gld. 2.50 Rb. 0.60

LA AKUPUNKTURO KAJ

KAŬTERIZO DE ĈINIO

Libreto pri speciala terapio de la ĉina medicino multmiljara kaj kun efiko eksterordinara.

Formato: 13 × 18.5 cm., ĉ. 18 p.

Prezo: £0-0-9 US\$0.10

Gld. 0.40 Rb. 0.09

Eldonis la Ĉina Esperanto-Ligo
Mendu ĉe EPĈ-perantoj aŭ rekte ĉe
nia Libro-Servo (p. o. kesto 313, Pekino)



DE MALDEKSTRE:

Ovoj el vilaĝoj estas glaciigitaj kaj pulvorigitaj.

Foto de Lu Ming

En ŝinko-farejo. Foto de Ĝang Genghing

Fiŝovendejo ĉe unu el la legombazaroj en Pekino.

Foto de Li Ĉangjong

Ĉinio, Paradizo sur la Tero

(La subtitoloj en la teksto estas de la Red.)

INVITITE de la Asocio de Amikeco inter Ĉinio kaj Latinameriko, mi alvenis al la Ĉina Popola Respubliko, la lando de antikva kultura tradicio, kaj en efektiveco la nova lando de nur dekkvar jaroj, plenumante mian deziron dum multaj jaroj.

PEKINO, ĈINIO

Mi venis de lando preskaŭ same granda kiel Ĉinio, ĝia popolo havas tian saman mizeron kia iam estis sed ne plu estas en Ĉinio. Mi vizitis kelkajn urbojn kaj vidis vastajn pecojn de bone prilaborita tero, kio min memorigis pri nia brazilaj popolo, pri la dudek sep milionoj da brazilaj kamparanoj vivantaj en malriĉeco, kies infanoj devis morti antaŭ ol ili atingis unujaran aĝon. Kaj en Pekino, mi vidis la grandan paradon en la Unua de Oktobro, mi emociigante vidis la paradantojn: la junulojn, infanojn kaj maljunulojn, kiuj hurais al sia granda gvidanto Maŭ Zedong, celebrante la festotagon de la Liberiĝo de la tuta popolo. Poste, ankaŭ en Nankino, Ŝanhajo, Hangĝou kaj Kantono mi vidis ke la popolanoj respektas sian grandan gvidanton, Prezidanton Maŭ de la Komunista Partio de Ĉinio kun la sama fervoro.

NOVA SERVO DE LIBROSERVO DE ĈEL.

KARAJ, LEGANTOJ,

Por helpi vin ĝustatempe kaj senmanke akiri novajn ĉinajn Esperantajn librojn deziratajn de vi, ni decidis de nun akcepti konstantajn libro-abonojn. La libroj estas dividitaj en:

- A. Verkoj de Maŭ Zedong;
- B. Fundamentaj scioj pri Ĉinio;
- C. Literaturaj kaj artaj libroj (inkluzive albumojn);
- Ĉ. Esperantaj libroj de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino (perataj de ni).

Oni povas libere elekti el la supraj klasifikoj. Sciigu al ni vian preferon kaj al viaj amikoj pri tiu ĉi nova servo.

Regularon pri la konstanta libro-abono kaj katalogon ni sendos al la petantoj.

LIBROSERVO DE ĈEL.

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

En Italio, estas urbo nomata Naples, kaj proverbo diras: "Vidinte Naples-on, oni mortos kontenta". Sed kiam ni alvenis al Ĉinio, ni povas diri: "Nur vidinte Ĉinion, ni komencas vivon". Ni esperas ke ni havos longan vivon, por ke ni povu rakonti al niaj samlandanoj pri Ĉinio, kie la ekspluatado de homo al homo jam malaperis; la virinoj havas tute egalan pozicion kaj ricevas egalan salajron kiel la viroj, ĉar ili havas la saman laborkapablon kiel la viroj; iliaj infanoj ĝuas la prizorgon de vartejo, infanĝardeno, lernejan edukadon kaj medicinan helpon.

NANKINO

Nankino estas bela urbo kiel ĝardeno. Ni vizitis vilaĝon, kiu estis nomata la "Malĝoja Vilaĝo" antaŭ la Liberiĝo, kaj kie vivis pli ol mil sepcent ekstreme malriĉaj loĝantoj. Tiam ili ĉiutage eĉ ne havis unu manĝon, sed devis serĉi manĝaĵon el rubejoj. Nun ili trovis la ĝustan vojon de vivo—la vojon de socialismo. La vilaĝo fariĝis jam "Feliĉa Vilaĝo".

En la vagonaro de Nankino al Ŝanhajo, mi vidis tra la fenestroj vastan kamparon tiel bone plugitan kaj plene utiligatan kiun mi neniam vidis antaŭe. Nur la popolo arde amanta sian patrujon kaj sian laboron povas elbrodi tiom delikatan verdan tapiŝon, tio montras al la brazilaj vojaĝantoj la forton de la popola komunumo kaj la forton de la organizita kolektiva laboro.

ŜANHAJO

Ŝanhajo, la mirinda urbo de intermiksitaĵoj de la oriento kaj okcidento, diras al ni la pasintan humiliĝan historion sub imperiisma regado, kaj la bravan sencedan batalon de la popolo kontraŭ imperiismo. Nun ĉio ĉi tio jam forpasis. Mi diros al nia popolo, kion mi vidis en tiu ĉi granda urbo. Mi vizitis la Palacon de Junaj Pioniroj ĉe Hjugiahuj, kie miloj da junaj pioniroj agadas en diversaj kampoj. Mi povos neniam forgesi la junajn fotografistojn, kiuj bonvenigis nin brazilanojn per siaj malgrandaj fotiloj. Ili donis al ni ĝojon de festotago. En Ŝanhajo ni vizitis ankaŭ la studejon de popola arto, kie estas dudek naŭ belaj formoj de popolaj artaĵoj. La laborantoj havas siajn proprajn infanĝardenojn kaj bebovartejon.

HANGĜOU

Denove senlima verda tapiŝo akompanis nin ĝis Hangĝou, tio estas tapiŝo vere multkolora, ne komparebla eĉ kun la koloroj de la plej bela malsimpla artaĵo, kaj nur la ĉina popolo povas ĝin krei.

Hangĝou estas urbo poezie bela kun la pitoreska Okcidenta Lago, ekspozitaĵoj de kelkmil-jara historio,

silkoteksejoj, teorboj, temploj, maŭzoleoj kaj belaj birdoj, kaj ĉio ĉi plene okupis la tridek naŭ horojn de nia vizito tie.

KANTONO

Nun mi venis en Kantonon, kaj ree vidis novan verdan tapiŝon, novan ĝardenon. Ni vizitis la tombejon de martiroj. Ni vidis la magazenojn plenajn de komercaĵoj kaj aĉetanoj. Mi konatiĝis kun novaj amikoj, sentis novajn ekscitiĝojn, vidis la fortikajn kaj belajn infanojn, kiuj piediris en kolono, aŭ man-en-mane sur la trotuaro. La malgrandaj rondaj kapoj kaj la etaj longaj harplektaĵoj svarmis sur la buntaj viglaj stratoj kaj en la ĝardenoj. En kinejoj, teatroj kaj ekspoziciejoj, ili adiaŭis per malgrandaj manoj al la vizitantoj. Tia estas Kantonon.

VERKISTO

Mia kara nova amikino Juju, kiu estas verkistino,

diris al mi, ke la ĉinaj verkistoj ricevas regulan salajron de la ŝtato krom honorarion por siaj verkoj. Ĉu la verkistoj en Brazilo povas sin vivteni nur per sia okupo de verkado? Ne. Mi ne povas rakonti ĉiujn detalojn kiujn mi vidis kaj pensis en Ĉinio, sed ili ĉiuj helpas antaŭenigi la lukton por liberigo de nia patrujo, kaj tial mi ĉiam memoros pri ili.

ADIAŬ

Morgaŭ mi forlasos Kantonon. Mi adiaŭas al tiu ĉi urbo kaj miaj novaj amikoj kun nedetenebla emocio. Ni disiĝos, sed niaj koroj neniam disiĝos. Kaj en Brazilo kaj en Ĉinio, ni estas fratoj, ĉar ni havas la saman ideon — la sencedan batalon kontraŭ imperiismo. Vivu la popolo en Kantonon. Kiam ni estos revenintaj al Brazilo, karaj amikoj, mi diros: "Se estas paradizo sur la tero, tio estas la juna Popola Respubliko de Ĉinio!"

TRAD. ĈEN HOŬHENG

WINIFRED SANDFORD:

La Horloĝo ĉe Pekina Stacidomo

*Paco en ĉi tiu ĝardeno
kie, en somero, la salikoj pendis
super la skarlataj kana-floroj*.*

*Ŝtonoj, eluziĝintaj dum jarcentoj
per piedoj molvestitaj,
kondukas inter ruĝaj kolonoj
ĝis kovrita promenejo,
kie tegoltegmentoj pendas
super traboj pripentritaj;
kaj dika infano, enĉovita nun
en vataj vestoj
ridas kaj ludas
ĉe la lunpordo,
kie la ruĝa suno brilas.*

*Sonorilo proksima al ĉi tiu ĝardeno,
ordonanta la malnovan jaron: Iru.
Jen horloĝo. Juna horloĝo,
kiu ne estas vidinta
ĉi tiun ĝardenon, kie la poetoj
kaj la pentristoj de la pasinteco
sidis, false trankvilaj,
aŭ la komfortan avarecon
de mortanta klaso,
aŭ la malsatulojn kaj la torturatojn,*

*kiuj tage balais ĉi tiun ĝardenon,
kaj nutris la riĉegan estron
ĉi tie sidantan . . . false trankvilan.*

*Sonoradu, juna horloĝo,
naskita en nova epoko
en malnova lando, kie nune
neniu ajn maljunulo
mortas pro senhaveco,
aŭ geviroj fikliniĝas
antaŭ riĉaĵoj.
Ĉi tiu ĝardeno ridetas
pro ĝia nova paco,
kaj nune la skarlataj kanaoj
similas al la ruĝaj standardoj
sur la Placo . . . en Nacia Tago.*

*Sonoradu, juna horloĝo
kaj diru al la homoj
en la tuta mondo,
ke ili fidu sian forton
por akiri de paco.*

*Sonoradu, stacia horloĝo,
kaj diru al ili,
kiel en tiu ĉi malnova lando
de poezio kaj floroj,
de mizero kaj batalado,
Nova Jaro venis triumfante
kaj alportis al ni
. . . Novan Vivon.*

* canna indica

La Altaj Lernejoj de Pekino

HODIAŬ, se vi veturos per aŭtobuso de la tridek-unua linio al la norda antaŭurbo de Pekino, vi rimarkos, ke plejparto de la nomoj de la haltejoj anoncataj de la konduktoj estas tiuj de altaj lernejoj: la Pekina Poŝto-telekomunika-Instituto, la Pekina Politiko-jura Instituto, la Pekina Filmarta Instituto, la Pekina Pedagogia Universitato, la Pekina Medicina Instituto, la Pekina Kolegio de Ferŝtala Metalurgio, la Pekina Kolegio de Petrol-mineralogio, la Pekina Kolegio de Geologio, Kinghua-universitato kaj la Pekina Universitato, la lasta stacio de la buslinio.

Simile, se vi veturos per aŭtobuso de la tridekdua linio al la okcidenta antaŭurbo, vi preterpasos la altajn lernejojn: la Centra Instituto por Nacioj, la Pekina Fremdlingva Instituto, la Ĉina Popola Universitato, la Pekina Universitato k. a.

Antaŭ la Liberiĝo, en la nordokcidenta antaŭurbo de Pekino estis vasta kamparo, kie s'n trovis nur du universitatoj Kinghua kaj Janking, sed post la Liberiĝo altaj lernejoj establiĝis kaj asfaltaj vojoj konstruiĝis unuj post aliaj. Nun, tie jam formiĝis aparta kvartalo de universitatoj kaj institutoj de Pekino.



Profesoro Ĝang Vej, vicdirektoro kaj estro de la Fakultato pri Inĝeniera Dinamiko kaj Matematiko de Kinghua-universitato, Pekino, gvidas esplorkonon de studentino.

Foto de Gu Dehua



Gestudentoj de la Pekina Kolegio de Geologio faras eksperimenton en la laboratorio pri hidraŭliko.

Foto de Hie Li

Gestudentoj en la fako de ĉinaj kuraciloj de la Pekina Medicina Instituto studas en la Ĉambro de Specimenoj.

Foto de Tan Ĝikiang

Unu el la domoj de la Pekina Kolegio de Ferŝtala Metalurgio.

Foto de Huang Ĝingda



LA ALTLERNEJOJ PLIIĜIS DE 14 ĜIS 50

Antaŭ la Liberiĝo, Pekino estis konata kiel progresinta urbo de kulturo kaj eduko en Ĉinio. La fama Pekina Universitato fondiĝis tie ĉi jam en 1898. Sed pro la detruo al la eduka afero fare de la tiama reakcia registaro, la alta eduko de Pekino progresis sufiĉe malrapide. Ĉe la Liberiĝo, nur 14 altaj lernejoj troviĝis en la tuta urbo.

Sed, en la dek kelkaj jaroj post la Liberiĝo la pekinaj altlernejoj pliiĝis jam ĝis 50. Laŭ statistiko, la totala areo de la 50 altlernejoj egalas al tiu de la interna urbo de Pekino. Inter ili sin trovas 3 sintezaj universitatoj, kaj 18 institutoj inĝenieraj, 4 agrikulturaj, forstokultura kaj meteorologia, 5 medicinaj, 5 pedagogiaj, 6 belartaj kaj 9 fizikokulturaj, politiko-juraj kaj financaj.


Laŭ la statistiko de 1948, en tiu jaro la nombro de la pekinaj studentoj de altaj lernejoj atingis ĉ. 14,000, sed en la jaro 1963 jam ĉ. 125,000, t. e. naŭoblo de tiu antaŭ la Liberiĝo. Samtempe, ankaŭ la nombro de instruistoj pliiĝis kelkoble. Nun, en tiuj altaj lernejoj laboras ĉ. 24,000 instruistoj, inter kiuj sin trovas ĉ. 1,600 profesoroj kaj asistprofesoroj, ĉ. 4,700 docentoj kaj ĉ. 17,000 asistantoj. Kaj ankaŭ bibliotekoj, laboratorioj, loĝejoj de instruistoj kaj studentoj ktp plimultiĝis grandnombre. Ni prenu la laboratoriojn de Kinghua-universitato kiel ekzemplon. En la jaro 1957, ĝi havis 59 laboratoriojn, sed poste, en la jaro 1962, kun la pliiĝo de fakultatoj ili jam multiĝis ĝis 81. La tuta plankareo de ĝiaj laboratorioj estas 8 obloj de tiu en 1949.

ARMEO DA FUNKCIULOJ PREPARITA POR LA PATRUJO

Post la Liberiĝo, la pekinaj altlernejoj liveris multe da laborantoj por la landa konstruado. Ek-

Post lecionhoru en la Pekina Universitato.

Foto de Hie Li



zemple, dum la 50 jaroj inter 1898 kaj 1948, la Pekina Universitato havis 6,600 diplomitojn, sed dum nur 10 jaroj post la Liberiĝo la nombro jam atingis 7,877. Dum la 37 jaroj ekde sia fondiĝo ĝis 1948, la Pekina Pedagogia Universitato havis 6,129 diplomitojn, sed dum nur 13 jaroj post la Liberiĝo ili jam nombriĝis 11,380. Krome, ankaŭ la Ĉina Universitato de Scienco kaj Teknologio kaj Pekina Ĥemi-industria Instituto fonditaj en 1958 jam havis siajn unuajn diplomitojn en la pasinta jaro.

Estas menciinda ankaŭ tio, ke post la Liberiĝo fondiĝis multaj industriaj institutoj unufakaj, ekzemple: la Pekina Kolegio de Petrol-mineralogio, la Pekina Kolegio de Geologio, la Pekina Mineralogia Instituto, la Pekina Kolegio de Ferŝtala Metalurgio k. a. Ĉiujare, tiuj institutoj kaj kolegioj preparas milojn da fakuloj por la lando.

La disvolviĝo de la pekinaj altlerneja eduko post la Liberiĝo ne nur montriĝis en la multiĝo de lernejoj, instruistoj kaj studentoj, sed ankaŭ en la altiĝo de eduka kvalito kaj en la intima ligo de la lerno de lernantoj kun la landa konstruo. Ekzemple, la diplomitaj studentoj de la Civil-inĝenierada Fakultato de Kinghua-universitato, sub la gvido de instruistoj, partoprenis la projektadon de la Muzeo de Revolucia Historio en Pekino kaj Mijun-akvorezervejo, kaj tiuj de la Maŝin-konstrua Fakultato de la dirita universitato mem projektis kaj fabrikis novajn ilmaŝinojn.

LA STUDENTOJ EL LABORISTAJ KAJ KAMPARANAJ FAMILIOJ PLIIĜIS JARON POST JARO

En la rapida disvolviĝo de la pekinaj altlerneja eduko aperis ĝojiga ŝanĝo: la nombro de la studentoj el laboristaj kaj kamparanaj familioj pliiĝis jaron post jaro; antaŭ la Liberiĝo gefiloj de la vasta laboranta popolo ne havis eblon ricevi edukon, sed nun

Uĝuraj gestudentoj lernantaj en la Arta Fakol de la Centra Instituto por Nacioj prezentas popolan dancon de Hingiang.

Foto de Gu Dehua





Juna vivo ĉe la Ĉina Universitato de Scienco kaj Teknologio (supre). Foto de Gu Dehua

Vicĉefministro He Long havas ĝojan renkontiĝon kun la gestudentoj kaj laborantoj de la Pekina Fizikkultura Instituto okaze de la dekjara jubileo de ĝia fondiĝo (dekstre). Foto de Ĝang Hesong



la stato radikale ŝanĝiĝis. Laŭ la statistiko de 1958, 39% el la pekinaj studentoj venis el laboristaj kaj kamparanaj familioj kaj en la lastaj jaroj tiu procento plue kreskis.

Nun, en la altaj lernejoj de Pekino studas ankaŭ multe da anoj de nacimalplimultoj kaj elmigrintaj ĉinoj revenintaj. La nacimalplimultaj studentoj sin nombras je ĉ. 4,000, kies plejparto studas en la Centra

Instituto por Nacioj, kiu sin okupas speciale por eduki fakulojn kaj administrantojn por la konstruado en la regionoj de nacimalplimultoj. La revenintaj elmigrintoj kiuj lernas preskaŭ en ĉiuj altlernejoj atingis la nombron de ĉ. 2,400.

Krome, ankaŭ la nombro de studentinoj rapide kreskis. Ili konsistigas 25% de la pekinaj studentoj, kaj ĉ. 70% de tiuj de la pekinaj medicinaj institutoj.

* KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

NOVAJ SUKCESOJ DE KAMPARANA SCIENCISTO

Sukcesis la kreskigo de multaj fruktarboj en malvarmaj montregionoj kun alto de pli ol 1700 metroj super la marnivelo. Tio estas farita de kamparana sciencisto Ĝang Ŝiking en Gansu-provinco. Per grefto de arbobranchoj el fruktarboj el Nordorienta Ĉinio al la lokaj sovaĝaj fruktarboj, li sukcesis kreskigi en tiu nordokcidenta malvarma montregiono pli ol dek specojn de pomarboj, pli ol kvindek specojn de fruktarboj de piro, persiko, abrikoto, vinbero, granato kaj aliaj fruktoj. Tio ebligas al la loĝantoj de la nordokcidenta regiono ĝui freŝajn fruktojn. Krom tio li

sukcesis ankaŭ kreskigi rizon en sia hejmloko.

SUBTROPIKAJ PLANTOJ EN MEZVARMAN REGIONON

Subtropikaj plantoj kiel kafo, banano kaj la aroma herbo *Cymbopogon nordus* ne kreskis en granda parto de Ĉinio kun temperaturo malpli alta. Por pli vaste kreskigi tiajn plantojn, ekde 1958 fondiĝas en Vangmu-gubernio de Buĵi-Miaŭa Aŭtonoma Subprovinco en Gujĝoŭ-provinco Esplora Instituto por Kreskigi Subtropikajn Plantojn. Nun ĝi jam sukcesis en la esplorado. Multaj tiaj plantoj estas kreskigitaj en la montaj regionoj de la suda parto de tiu provinco.

VERKISTO PETAS KONSILOJN DE KAMPARANOJ

Antaŭ nelonge eldoniĝis nova novelaro *En la Kamparo* de Ĝaŭ Ŝuli, fama kamparana verkisto de Ĉinio. Por bone scii kiel la kamparanoj opinias pri liaj noveloj kaj ĉu liaj verkoj povas iel servi al ili, k-do Ĝaŭ Ŝuli invitis membrojn el sep popolaj komunumoj proksimaj al Pekino, kaj kunsidis kun ili. La verkoj de k-do Ĝaŭ Ŝuli estas alte taksitaj de la kamparanoj. Ili diris, ke la verkoj bone spegulas la realan staton de la kamparo kaj estas tre instruaj. Ili ankaŭ laŭdis la simplecon kaj vivecon de la lingvo, kio sentigas familiarecon al la legantoj.

Novaj Atingoj de Ĉina Literaturo

LA literaturaj verkoj de la nova Ĉinio elspiras fortan, freŝan odoron de la epoko kaj enhavas fidelajn priskribojn de la reala vivo. Ili klare sin distingas de tiuj de la pasinteco.

En la pasinteco la literaturaj verkoj, inkluzive de la progresema kaj revoluciaj priskribis ĉefe la vivon de la meza kaj supera socitavoloj sed tre malmulte la vivon kaj lukton de la laboristoj kaj kamparanoj, pro limigo de la kondiĉoj tiutempaj en kiuj vivis la verkistoj, kaj de iliaj vivsperto kaj pensmaniero. La literaturaj verkoj de la nova Ĉinio tamen plej vive kaj fervore priskribas la luktojn kaj vivon de la ĉina laboranta popolo kaj ĝian novan fizionomion. La laboruloj farigis herooj en la verkoj de literaturo.

Depost la fondiĝo de la nova Ĉinio, la ĉinaj verkistoj ĉiuj multe klopodas penetri profunde en la vivon kaj en la amasojn por koni iliajn vivon kaj pensojn. Kaj sufiĉe multaj verkistoj jam havis longtempajn praktikajn spertojn en kunlukto kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Tial, ili povas ĝuste kompreni ilin kaj havas la deziron kaj kapablon ilin priskribi.

Multaj veteranaĵ verkistoj, kiaj Kuo Mojo, Maŭ Dun, Laŭ Ŝe, Bakin, Tian Han, Caŭ Ju kaj aliaj, inspirite de la novaj luktoj kaj nova vivo, elmontras pli da fervoro kaj energio por kreado, kaj jam donis novajn koloron kaj enhavon en siaj verkoj. Kaj multaj junaj verkistoj elmontras senliman kreivon kaj jam produktis nombron da elstaraj literaturaĵoj.

La populara romano *Kamaradoj sub la Ruĝa Flago* estas bona ekzemplo. Liang Bin, la aŭtoro, dum ĉ. tridek jaroj neniam staris for de la popolaĵ luktoj de la gubernio Lihian, Hebej-provinco. Li persone travivis la kruelajn jarojn kaj partoprenis en la komuna sorto de la popolo; li vidis ĝiajn suferojn kaj luktojn senĉesajn kaj vidis ankaŭ, kiel ili fine venkis post grandaj oferoj. La deziro priskribi la "altan figuron de la ĉina kamparano" ĉiam inspiras lin. Kun siaj personaĵ spertoj li diligente studis la luktan historion de la ĉinaj kamparanoj en la pasintaj generacioj, kaj fine sukcesis krei en sia verko la figuron de revolucia kamparano Ĝu Laŭgong.

La konataj verkistoj, Ĝaŭ Ŝuli kaj Liu King antaŭe jam bone konis la vivon en la kamparo. Post la Liberiĝo, ili denove partoprenis en la luktoj de la revoluciaj kamparanoj kun plena fervoro. Ĝaŭ Ŝuli ĉiam tenas intiman rilaton kun sia naskiĝloko en la montregiono Tajhang; Liu King jam longan tempon kunvivis kun kamparanoj en Huangpu-vilaĝo de

Ĉang-an-gubernio, Ŝenhi-provinco kaj partoprenis en la luktoj de tiaj kamparaj historiaj ŝanĝiĝoj kiaj agrara reformo, kooperativigo kaj la fondiĝo de la popolkomunumo. La novelo *Sanlivan-vilaĝo* de Ĝaŭ Ŝuli kaj la romano *Historio de Entrepreno* de Liu King estas rikoltoj de iliaj penoj. La solidaj vivspertoj ebligis iliajn verkojn profunde respeguli la evoluadon de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj la ŝanĝiĝon de la k'asrilatoj en la ĉina kamparo. Pli grave estas, ke ili ne nur sukcese priskribis la ŝanĝojn de la spirita fizionomio de la kamparanoj de la maljuna generacio, travivintaj multajn suferojn, sed ankaŭ la kreskadon de la novtipa kamparano kun la nuntempa progresema ideologio.

La romano *Ruĝa Roko* estas alia ekzemplo, eĉ pli trafa. Ĝi priskribas la kortuŝajn luktojn kaj heroaĵojn de ĉinaj revoluciuloj morte turmentataj en la du koncentrejoj Ĝazidong kaj Bajgongguan de la plej malluma kaj kruela hombuĉa establajo de la usonaj imperialistoj kaj Ĉiang Kaj-ŝek, la "Ĉini-usona Organizo de Kunlaborado". Ĝiaj aŭtoroj, Luo Guangbin kaj Jang Jijan, persone travivis la nehoman vivon de la koncentrejo, ili estas vidintoj kaj partoprenintoj de la luktoj en la koncentrejoj. Ĉar la personaĵ travivaĵoj kiujn ili havas, la profunda malamo kontraŭ la usonaj kaj Ĉiang Kaj-ŝekaj murdistoj kaj alta estimo al la suferintaj revoluciuloj estas fidele respegulitaj en la romano, tial ĝi forte kortuŝas la legantojn.

La kaŭzo, kial aliaj ĉinaj bonaj verkistoj, kiaj la poetoj Li Gi kaj Ven Ĝie, la novelistoj Ma Feng, Vang Venŝi kaj Li Ĝun povas de tempo al tempo krei bonajn verkojn, estas ke ili neniam neglektis sian ligan kun la reala vivo kaj la amaso.

Ĉinaj verkistoj ne nur bone scias la vivon kaj luktojn de la amaso kaj ĝian spiritan fizionomion, sed ankaŭ bone scias ĝiajn inklinon kaj intereson pri arto, la artajn stilojn kaj formojn de ĝi, kaj tio grave influis la stilon de arta kreado de multaj verkistoj. Sub la direkto de naciigo kaj popularigo, ili klopodas krei kaj disvolvi sian personan stilon; rilate la uzadon de artistia lingvo, ili ĉiuj faris novajn provojn.

Alia menciinda fenomeno de la literaturo de la nova Ĉinio estas la ŝanĝiĝoj kaj kreskado de la verkista vicaro. La profesiaj verkistoj marŝas en la direkto de servado al la laboristaro, kamparanaro kaj soldataro kaj akiris sukcesojn kaj pluan evoluon en sia kreado; aliflanke, novaj geniaj verkistoj aperadas de tempo al tempo, multaj el ili estas laboristoj, kam-

La Ĉina Palaca Lanterno

EN la pasinteco, la palaca lanterno estis uzata nur en la imperiestra palaco. Sed nun, ĝi jam fariĝis simbolo de ĝojaj festotagoj kaj bela metiartajo ĉe la ĉina popolo.

Ĉar la imperiestra palaco estis alta kaj vasta, tial la palaclanternon oni ne uzas unuope sed ĉiam en paroj kaj kompleto. Unu kompleto konsistas el 32 aŭ 48 lanternoj, iam eĉ el 64 kaj minimume el 4 aŭ 2 lanternoj. Dank' al tia ilumino la grandiozaj konstruaĵoj fariĝis pli pompaj kaj imponaj.

La ĉina palaca lanterno disvolviĝis ekde 1420 p.K. en Pekino. Ĝi ne nur devas esti pendigita simetrie en kompleto kaj paroj, sed ankaŭ ĝia formo estas simetria. Tio ĝuste spegulas la tradician karakteron de la ĉina desegna arto. La palacaj lanternoj havas malsamajn altojn. La plej alta estas de 5 futoj kaj la malplej alta, de 2 futoj. Estas palacaj lanternoj kun tubo kvaredra, kvinedra, aŭ sesedra; sed inter ili tiu kun la kvaredra tubo estas rigardata kiel normala formo kaj ĝi estis plej ofte uzata en imperiestra palaco.

Laŭgarniture oni povas dividi la palacajn lanternojn en du specojn: kunalera kaj senalera*. La du specoj diferencas nur en la havo kaj nehavo de alero. Iliaj framoj estas faritaj el kompaktaj kaj bonodoraj lignoj, speciale produktitaj en Ĉinio. Ĉiu el la kolonetoj estas aĵure gravurita. La supra borderaĵo de la senalera palaca lanterno estas iom pli larĝa, dum sur tiu de la kunalera palaca lanterno troviĝas aldonita delikata alero, kiu pli beligas la palacan lanternon. Al la supro de la lanterno estas alligita kupra ĉeno por pendigo. Kaj de la malsupro de la lanterno pendas longa kvasto el ruĝaj silkfadenoj, kun tri blankjadaj ringoj en formo de ĉina antikva monero, ĉe la palaclanternoj pendas ankaŭ de ĉiu angulo de la elstara alero tia spikaĵo, iom malpli granda sed samforma. La ĉirkaŭaj edroj de la lanterno estas

tegitaj de interne aŭ per blanka tulo speciale produktita en Ĉinio, aŭ garnita per delikata vitro. La blankan tulon kaj vitron ornamas aŭ belskribajoj aŭ pentraĵoj ĉinstilaj. Tiuj belaj pentraĵoj temas aŭ pri rakontoj de klasikaj literaturaj verkoj kaj pri anekdotoj de famaj antikvuloj, aŭ pri pitoreskaj pejzaĝoj kaj raraj floroj. Ĉiu kompleto da palacaj lanternoj surhavas serion da bildoj samtemaj, kaj por pluraj lanterno-kompletoj oni alprenis malsamajn temojn. Post noktiĝo, kiam eklumiĝis ĉiuj lanternoj, tiuj pompaj iluminiloj kun la flirtetantaj kvastoj kaj belaj bildoj formis vere ĉarman spektaklon.

En okazo de la Novjaro aŭ festotago, ĉinoj ŝatas intensigi la festan atmosferon per lanternoj kaj aliaj ornamoj. Okaze de la Novjaro ankaŭ popolanoj pendigas senalerajn kvadratajn palacajn lanternojn. Plejparto de la bildoj sur tiuj lanternoj temas pri rakontoj el ĉinaj popularaj romanoj kaj ili donas al ni ne nur ĝuon de belo, sed ankaŭ multe da scio pri literaturo.

La farado de la palacaj lanternoj multe disvolviĝis en la nova Ĉinio. Oni aplikas elektrolampon kiel lumigilon, kaj la palaca lanterno fariĝis pli luma kaj la bildoj pli klaraj. En 1959 en Guangdong-provinco estis elfaritaj palacaj lanternoj kun vitrofadena tubo kaj moveblaj hombildoj interne. Post lumigo de la lanterno, la bildoj malrapide turniras kaj la homfiguroj estis projekciitaj sur la vitrajn "vandojn" kun aparta viveco kaj ĉarmo. Kaj la elegantaj palacaj lanternoj produktitaj de la Pekina Farejo de Palacaj Lanternoj kaj Murpentraĵoj ne nur ĝuas grandan ŝaton ĉe la popolamasoj enlandaj, sed varman akcepton de eksterlandaj geamikoj.

* Alero — tegmenta elstaraĵo ĉe la randoj.

paranoj kaj soldatoj. Ekzemple, la juna mongola verkisto, Ulan Bagan, dum sia infaneco estis kruele subpremita de la terposedantaj princoj. Kiam li aliĝis al la revolucia armeo, li estis nur knabo kulture tre malaltnivela. Sed li deziras rakonti al aliaj pri siaj travivaĵoj kaj luktopertoj. Li verkis la bonan romanon *Signal fajro sur la Stepo* sub la zorgo kaj eduko de la gvidantoj. Hu Vanĉun, juna forĝisto, jam fariĝis aŭtoro de kelkaj novelaroj. Aliaj verkistoj, kiaj Tang Kehin, Fej Liven, Liu Jong kaj aliaj, ĉiuj estas labo-

ristoj aŭ kamparanoj kaj havas sian karieron de verkisto tre kortuŝan.

Lastatempe, multaj malnovaj revoluciuloj komencis skribi rakontojn pri siaj pasintaj luktoj kaj aperis jam multaj bonegaj rememoroj pri la revoluciaj laboroj, kiaj *Fajrero Incendiigis la Stepon*, *Flirtas la Ruĝa Flago*, kaj historioj de fabrikoj, komunumoj, k.t.p. La suprediritaj faktoj atestas, ke la tuta armeo de la ĉinaj verkistoj multe kreskis kaj en kvanto kaj en kvalito.

La Unua Leciono

ESTIS frumateno. Oni ankoraŭ ne sonorigis por ellitigo. Regis silento en la lernejo.

El la instruistina loĝejo eliris junulino, kun kartona paperujo sub la brako. Ŝi finis antaŭ nelonge sian studadon en pedagogia instituto kaj hodiaŭ, la unua tago de la nova semestro de la elementa lernejo, estis dononta la unuan lecionon en sia vivo.

Ŝi eniris la instruistan ĉambron, sed trovis neniun en ĝi — estis ja tro frue. Ŝi paŝis al sia skribotablo kaj vidis sur ĝi glaseton, metitan de oni ne scias kiu. En la glaseto brilis klara akvo kaj staris kelkaj asparagoj* kaj du ruĝaj floretoj, kies nomon ŝi ne konis.

Kiu ilin metis tie? La knabino pensis, kaj ridis. Ŝi ekrememoris la tagon de la pasinta semajno, en kiu ŝi venis al la lernejo por sin anonci.

Tiutage pluvis, kiam ŝi iris survoje. Apenaŭ ŝi enpaŝis la pordegon de la lernejo, aperis pluraj geinstruistoj por ŝin akcepti. Unu el ili estis maljuna instruistino, kiu donis al ŝi pluvmantelon per unu mano kaj prenis per alia ŝian valizon. Poste, la maljuna instruistino helpis ŝin aranĝi ŝian liton kaj portis al ŝi tason da bolinta akvo. Tio plenigis sian koron per varmsento.

Ilustraĵoj de Vu Venjuan



“Ve, se oni ne ŝanĝus nian instruistinon! . . .”

Nokte, ili dormis kapon kontraŭ kapo, en du litoj linie kunmetitaj. Ili ne povis tuj endormiĝi, kaj interbabilis.

“Kamaradino, kion mi devos fari ĉe la komenco de mia laboro?” demandis la junulino.

“Ami la geknabojn. Sen amo, oni ne povas eĉ paroli pri la edukado.”

“Jes. Kaj krome?”

“Krome, estas necese kuraĝi kaj scii sin korekti. Ni ne havas rajton postuli de la lernantoj tion kion ni mem ne povas fari.”

El la konversacio la knabino sciigis, ke la maljunulino estas fama veteranino kun tridekjara sperto de instruado, kaj ke la klaso, kiun ŝi instruos, estis instruita pasintjare ĝuste de tiu ĉi maljunulino.

Tiam, ankore la knabino jam prenis ŝin kiel sian instruantinon.

Hieraŭ nokte, kiam ŝi iris al la skribotablo de la maljuna instruistino, tiu ĉi diris al ŝi: “Morgaŭ komenciĝos la lernado. Certe estos bone, se ni sukcese instruos la unuan lecionon. Se ni malsukcesos, la lernantoj ankaŭ ne tuj kulpigos nin. Sed se ni provos kaŝi niajn erarojn, ili nin ne pardonos.”

* *Asparagus lucidus var. pypmaeus makino.*

La knabino aŭskultis ridetante. Ŝia rigardo hazarde falis sur la tablon de la maljunulino, sur kiu staris vazo da verdaj asparagoj kaj vazo da ruĝaj floretoj, kies nomon ŝi ne sciis.

Nun la floroj kaj herbo troviĝis antaŭ ŝi, en la glaso. Ŝi ĉion komprenis.

Sonoris la ellitiĝo. Tuj vigliĝis la lernejo.

La junulino eliris el la instruista ĉambro kaj sencele promenis. Apud la malgranda botanika ĝardeno ŝi aŭdis, ke iuj parolas en ĝi.

“Oni diras, ke ŝi estas ĵus gradigita,” sonis klara voĉo.

“Ho, kia malfeliĉo!” diris voĉo obtuza, rigida.

“Ve, se oni ne ŝanĝus nian instruistinon! . . .” denove parolis la klara voĉo.

Tra la folioj kaj branĉetoj, la junulino vidis du knabojn priverŝantajn la ĝardenon. La pli aĝa el ili havis harojn hirtajn kiel broso.

La junulino klinis la kapon kaj iris returne. En la koridoro ŝi renkontis la maljunan instruistinon. Tiu ĉi rapidis al ŝi kaj diris: “Estas afero kiun mi forgesis diri al vi. Ĉar hieraŭ estis dimanĉo, hodiaŭ matene la aŭbusoveturantoj certe pli multiĝas. Povas okazi, ke iuj lernantoj alvenos malfrue. Sed ili estas decaj, preferante atendi ekster la klasĉambro ĝis la fino de la unua leciono, por ne ĝeni la lernadon de aliaj. Vi devas tion atenti.”

“Jes,” respondis la junulino. Rigardante la dorson de la foriranta maljuna instruistino, ŝi diris en si: “Ŝi ne preterlasas eĉ tian detalon. Estas kompreneble, ke ĉiu, instruita de tia instruistino, sentas malfeliĉon, se li devas lerni de alia anstataŭ ŝi.”

Estis la lernohoro. La nova instruistino paŝis en la klasĉambro kaj komencis la lecionon.

Ĉio iris bone. Sed regis en la ĉambro streĉeco. Sidis ĉe angulo la knabo kun hirtaj haroj. La junu-



“Mia instruistino, ĉifoje vi tamen eraras...”

lino iom konsterniĝis. Ho, estis tempo instrui la skribon!

Ŝi malfermis la ladan skatolon kaj elprenis kreton. Skribinte sur la nigra tabulo, ŝi daŭrigis sian instruadon.

(Daŭrigo sur p. 78)

(Daŭrigo de p. 94)

*S-aniño **Anna Siwinska**, Międzybórz, pow. Syców, Woj. Wrocław, Pollando, kun pli aĝaj seriozaj esp-istoj, precipe el malproksimaj landoj por interŝ. leterojn pri ĉt., bk., k diversajojn.

*25 **Membroj de Esp. sekcio** ĉe Internacia Klubo “Amikeco” en Agrikultura Akademio, kun ĉl., precipe junuloj pri ĉt. Ankaŭ dez. ricevi diversajn esp-taĵojn. Resp. garantiata. Adr.: USSR, Litova SSR, Kaunas-4, Kestuĉio 27, Internacia Klubo (Esperanto).

***Piotrowski Tadeusz**, Zielona 5, Poŝtfako 1, Pollando (23-j. fraŭlo), kun azilandanoj pri nacikutimoj, vivproblemoj k. a., ankaŭ interŝ. pk., pm. Certe resp.

***La jenaj geesp-istoj en Bulgario dez. kor. kun ĉl. k interŝ. bk k fotojn:**

S-ro **Mihail Arnaŭdov**, mebloinstruisto, Bjala, str. “Ĥaniŝta” 4, precipe kun samfakuloj.

S-ino **Ivanka Ĥristova Kozleva**, kontistino, Ruse, str. D. Blagoev, 26 Vhod “B”.

S-ino **Donka Ivanova** Paneva, kontistino, Ruse, str. Duĥovno Valrajdane, 19.

S-ro **Ivan Danailov**, Aprilovo, Gabrovska.

S-ro **Damjan Manolov**, oficisto, Ruse, str. “D. Anastasou”, 10.

S-ino **Petranka Petkova Pulĉeva**, Ruse, str. “Bitolja” 1.

S-ino **Nedjalka Pavlova**, Ruse, Pl. “Dunav” 12.

F-ino **Danka Dimova Ivanova**, Ruse, str. “Parĉeviĉ”, 9-a.

S-ino **Nadejda Georgieva Ginĉeva**, poŝt oficistino, Ruse, str. “Su. Gora” 5.

La Kinejoj en Ŝanhajo

IUTAGE mi akompanis amikon el malproksima loko viziti kinejon. Subite li min demandis: "Ĉu vi scias kiu kinejo en Ŝanhajo havas la plej longan historion?" Tiu ĉi demando vekis en mi intereson por informiĝi pri la kinejoj en Ŝanhajo. La unua kinejo en Ŝanhajo fondiĝis en 1908, sed filmo jam estis projekciita en Ŝanhajo kvar jarojn pli frue. Tiam iu hispano alportis kinematografon kaj filmon, luis ĉambregon kaj projekciis la filmon sur ekrano el blanka tuko. Tio estis la unua filmoprezentado en Ĉinio. Pro scivolemo ŝanhajanoj arde volis spekti. Tial tiu hispana aventuristo gajnis multe da mono. En 1908 li konstruigis la Grandan Teatron de Hongkoŭ, kiu estas la unua kinejo en la historio de Ŝanhajo. Post t'io, vidinte ke tio estas tre profitdona afero, ankaŭ aliaj fremdaj aventuristoj en Ŝanhajo konstruigis kinejojn unu post alia. Pli poste ankaŭ la usonaj kapitalistoj en Hollywood etendis siajn manojn en Ŝanhajon. En la tempo antaŭ la Liberiĝo de Ŝanhajo multaj grandaj kinejoj preskaŭ estis tute sub la kontrolo de Hollywood kaj fariĝis plej efikaj instrumentoj por propagandi la putran vivmanieron de Usono.


Parolante pri la historio de la kinejoj en Ŝanhajo, ni ne povas ne menciigi Daguangming-kinejon.

Tiu ĉi teatro, staranta sur la Nanking-strato, apud la Internacia Hotelo, estis konstruita en 1933. La kosto de ĝia konstruado estis miliono da juanoj, kaj ĝi estis konata kiel unuaranga en la malproksima oriento. Ĝi estas moderna konstruaĵo kun fasado dekoraciita per kolora marmora mozaiko, kun ĉirkaŭ dumil komfortaj sidlokoj kaj pompa ripozĉambro, ekipita per instalaĵo por moderigi la aertemperaturon. Krome, ĉe la pordo alte staras lumturo. Post la Liberiĝo ĝi fariĝis la unua kinejo larĝekrana.

Ankaŭ la historio de tiu ĉi kinoteatro estas markita de la humiliĝo kaj amareco de la ĉina popolo en la malnova tempo. Kiam la konstruado de Daguangming-kinejo finiĝis, ŝanhajaj kinematografaj entreprenoj estis sub la monopolo de ok grandaj filmokompanioj de Hollywood, kaj la tiama socio estis regata de friponoj. Krom usonaj filmoj, oni povis projekcii neniun filmon kaj sen postkulisa projektanto, oni ne povis eviti ĝenojn de friponoj. Sekve, Daguangming-kinejo havis neniun elekton ol interrilatiĝi kun grandaj usonaj kapitalistoj kaj portis sur



(Supre) Daguangming-kinejo antaŭ la liberiĝo kaj (dekstre) ĝia nuna aspekto.



sia nomo la skribon "usona entrepreno", kvankam 95% de la kapitalo de tiu ĉi teatro venis el la poŝoj de ĉinoj.

Kiel "usona entrepreno", ĉio de Daguangming-kinejo estis usonigita. La prezo de enirbileto altis je du arĝentaj juanoj. Ĉinaj vizitantoj en malnovaj aŭ flikitaj vestoj ne estis permesitaj eniri. Multaj filmoj insultantaj ĉinojn estis publike surekranigitaj. Tia netolerebla stato daŭris ĝis la Liberiĝo.

Iutage mi rigardis la prezentadon de la filmo "Legendo pri Bravulo" en Daguangming-kinejo. Apud mi sidis novgeedza paro el vilaĝo eksterurba. La edzo diris al mi: "Hej, se ne estus liberiĝo, kiel ni povus viziti tiun ĉi teatron?" Prave, tiu ĉi diro ĝuste respiegulas la ŝanĝiĝon de Daguangming-kinejo.

Similaj ŝanĝiĝoj kiel tiu de Daguangming-kinejo ne estas malmultaj en Ŝanhajo.

Post la Liberiĝo, oni ne nur ŝanĝis la kinejojn, kiuj antaŭe nur projekciis flavajn filmojn, en kulturajn amuzejojn por la popolo, kaj larĝe malfermis al la laboruloj la pordon de la luksaj kinejoj, kiuj servis pasinte nur al malmultnombraj riĉuloj, sed ankaŭ rekonstruis aŭ nove konstruis multajn kinejojn, inter kiuj estas tiuj de larĝa ekrano, de stereoskopaj filmoj kaj tiuj kiuj speciale projekcias dokumentajn filmojn.

(Daŭrigo de p. 76)

Subite, flugis en la aero malgranda papervolvajo, kiu, evidente, alteriĝis antaŭ ol trafi la difinitan celon. La instruistino paŝis al ĝi, ĝin levis, malfermis kaj legis: "Rigardu al la nigra tabulo!! Eraro!!!"

Ŝi turnis sian rigardon al la nigra tabulo kaj ekruĝiĝis. Kion fari? Kompreneble — ĝin korektu! Ne, atendu. Ŝi elprenis la ruĝan kreton el la lada skatolo kaj forte strekis grandan krucon ĉe la erara ideografiaĵo. Poste ŝi apudskribis la ĝustan.

"Tiu ĉi ideografiaĵo mi skribis erare. Iu el vi tion rimarkis; tio estas bona. Sed estus plibone, se li levus la manon kaj al mi dirus."

Ŝi demetis la ruĝan kreton, malkrispigis la slipeton kaj atente ĝin metis en sian paperujon. La geknaboj rigardis ĉiujn agojn de la instruistino, tute silente, ne lasante aŭdi eĉ siajn spirojn.

Neatendite ekstaris knabo. Li klinis la kapon plenkovritan de hirtaj haroj, kaj diris: "La slipeto estas skribita de mi. Mi kulpas. . ."

"Bone, mi scias. Sidiĝu."

Oni ne scias kial, la atmosfero en la klasĉambro tuj ŝanĝiĝis. Ŝajnis, ke la haroj de la rigidnuka knabo multe moliĝis.

Daŭris la instruado. La instruistino hazarde trovis vakantan sidlokon. Jes, kiam komenciĝis la leciono, la klasestro jam raportis al ŝi, ke mankas

Multaj nove-konstruitaj kinejoj lokiĝas en la kvartaloj, kie loĝas pli multe da laboruloj kaj estas pli malproksime de la urbocentro. Antaŭe por la loĝantoj en la foraj lokoj ekster la urbo rigardi filmoprezentadon ne estis facila afero. Nun preskaŭ en ĉiu kvartalo de fabrikoj kaj loĝpunktoj, troviĝas kinejo. En la printempo de 1962 mi vizitis multajn vilaĝetojn eksterurbajn de Ŝanhajo. Preskaŭ en ĉiu vilaĝeto estas kinejo.

Post la Liberiĝo, same kiel en aliaj lokoj enlandaj oni havas unu plian favoran kondiĉon en Ŝanhajo por viziti kinejojn, t.e. malkareco de eniro. La plej alta prezo de enirbileto de la unuaranga kinoteatro en Ŝanhajo estas nur 40 cendoj. Tiuj de la speciala prezento por infanoj estas nur 10 cendoj, kaj por mallongaj dokumentaj filmoj 5 cendoj sufiĉas.

Kial la kinejoj en Ŝanhajo estas tiel multaj kaj la enirbileto tiel malkara? Mi ricevis la respondon de iu maljuna kino-entreprenisto: "Kio estas nefacile komprenebla en tio? En la malnova socio oni establis kinejojn nur por ĉaso de mono, sed nun por servi al la kultura vivo de la laboruloj. La celo estas tute malsama. Nuntempe la kinejoj en Ŝanhajo defundamente ŝanĝiĝis. Ili vere estas amuzejoj de la popolamaso."

unu lernanto. Ŝi ĵetis rigardon tra la fenestro al la koridoro kaj vidis knabon, kiu kaŭris ĉe la muro, kun lernolibro sur la tero kaj kajero sur la genuoj. Ŝi malfermis la pordon kaj vokis: "Envenu. Morgaŭ ellitiĝu pli frue."

Vigliĝis la lernantaro. Kiel bone iris la instruado! La geknaboj estis tre kontentaj. Se ne, kial ili stariĝis tiel orde kaj energie ĉe la finiĝo de la leciono?

Ili iris al la instruistino kaj ĉirkaŭis ŝin, demandante tion kaj ĉi tion. La instruistino ridis kaj respondis. Ŝiaj okuloj tamen serĉis la obstinan knabon. Kie li estis? Ho, li estis puriganta la nigran tabulon, forte viŝante la grandan krucon!

La instruistino eksentis varmon en sia koro. . . .

Post tagmanĝo, kiam ŝi eniris la instruistan ĉambron, ŝi trovis sur sia tablo bluetan leterpaperon, metitan sub la florglaso, kiu legiĝis jene:

„. . . Vi bone donis la unuan lecionon. La geknaboj jam rakontis al mi ĉion. Vi pravus tiel agante. Ili fidis je vi, kaj vi akiris la rajton fari al ili postulojn. La signifon de la sukceso de la unua leciono ni sufiĉe komprenos eble post deko da jaroj. Mi iras al kunveno. Ĝis la nokto. . . .”

La junulino premis la leteron al sia brusto, murmurante: "Mia instruistino, ĉifoje vi tamen eraras. Ne mi donis bonan lecionon al la geknaboj, sed vi kaj la geknaboj donis al mi bonan unuan lecionon, kiun mi neniam forgesos!"

La Komunuma Sekretario

GUO ĈENKING

MI malsupreniris de urbo por labori en vilaĝo kaj estis asignita al mi tasko de propagandisto. Hodiaŭ mi enoficiĝis.

Forlasiteco regis en la oficejo de la komunumo. Tie restis nur la skribisto. Li estis tre afabla. Elverŝante trinkakvon por mi, li sciigis al mi kiu estas la sekretario, kiu la direktoro, kiu prirespondas organizan laboron, kiu civilan administradon. . . .

“Kien ili ĉiuj foriris?” mi demandis al li.

“Ĉiuj subiris al la brigadoj,” respondis la skribisto, kiu montrante al la telefon-aparato daŭrigis, “estas tio ĉi, kio malebligas mian foriron.”

“Kiam subiris sekretario Hiang?”

“Hodiaŭ matene,” respondis la skribisto. “Li haste revenis hieraŭ vespere kaj doninte telefonan raporton al la gubernia partikomitato denove foriris hodiaŭ frumatene.”

“Kien li iris?”

“Lasu min rigardi.” La skribisto iris al la pordo de la ĉambro kaj ĵetinte ekrigardon al la sudorienta murangulo, diris returnante la kapon: “Li iris al la sudo.”

Ĉe la sudorienta murangulo sin trovis nur malgranda kabano. Kiel li povis scii per la ekrigardo la ir-direkton de la sekretario? Verŝajne la sagaca skribisto divenis pri kio mi dubis, kaj li meminciate klarigis:

“Hiangĉjo havas kutimon, ke li nepre kunportas ĉasan fusilon irante suden kaj fekaj-korbon irante norden. Nun restas ne la fusilo sed la fekaj-korbo. Sendube li iris suden.”

“Pro kio?”

“Aŭskultu mian klarigon. En la nordo estas ŝoseo, kie multas venturiloj kaj ĉevaloj, kaj abundas fekajo. Se vi iras tien kun korbo sur dorso, certe vi revenos kun plena korbo. En la sudo estas loesa monteĝo, kie multas herboj, kavernoj kaj sovaĝaj bestoj. Se vi iras tien kun ĉasa fusilo sur ŝultro, viaj manoj certe ne restos malplenaj.”

“Do ni povas ofte manĝi viandon, ĉu ne?”

“Kiel povas esti! Ĉiuj la ĉasajoj estas senditaj al la Hejmo de Maljunuloj.”

Mi havas fortan inklinon al ĉasado, tial mi demandis kun ĝojo:

“Ĉu la sekretario lertas en pafado?”

“Trafo je ĉiu pafo. Li estas la unua pafisto en la komunumo.”

“Kiam li sin ekzercis ĝis tia lerteco?”

“Tion mi ne bone scias,” respondis la skribisto. “Mi estas en la komunumo nur iom pli ol unu monaton. Krome, li estas ĉiam ekstere kaj mi ĉiam en la oficejo. La okazoj por intervidiĝi estas malmultaj.”

Mi forte deziris tuj vidi sekretarion Hiang tiutempe, unue por ke li asigu al mi laboron, due por ke mi ĝue vidu lian kapablon en ĉasado. Sed la skribisto diris: “Estas ne certe kiam sekretario Hiang revenos.” “Se li ne revenos,” li proponis, “vi havos nenion por fari. Laŭ mia opinio, prefere vi iru por lin trovi.”

“Kien mi iru por lin trovi?”

“Sin trovas nemulte da vilaĝoj en la sudo, la grandaj kaj la malgrandaj entute nur ses. . . .”

“Sed mi ne konas sekretarion Hiang!”

La skribisto fingre montris al sia buŝo kaj diris: “Ĉu vi ne havas ĉi tion? Se vi nur pridemandos, en ĉiu ajn vilaĝo, neniu plenaĝulo aŭ infano ne konas lin!”

Mi forlasis la oficejon de la komunumo, eliris el la vilaĝo kaj paŝis rekte suden laŭ la traktora vojo ombrata de salikoj. Ambaŭflanke de la ŝoseo la grenplantaĵoj, altaj kaj malaltaj, formis vastegan malhelan verdejon. La sorgo superkreskis homkapon, la rizo altis ĝis la talio, la arakidaj plantoj kovris la teron, kaj la kotonarbetoj staris kun interplektitaj suproj. Helis la tago, sed humidis la grundo. La spikoj ondadis en vento. Abundan rikolton antaŭvidigas parcelo post parcelo. Mi aŭdis grupon da laborantaj komunumanoj verŝajne priparolantaj sekretarion Hiang, tial mi demandis profitante la ŝancon: “He, pardonon, ĉu vi vidis sekretarion Hiang?”

“Jes, li ĵus preterpasis kaj iris al Fangĝuangvilaĝo,” diris iu parolema knabino kun mangestoj. “Iru antaŭen laŭ la traktora ŝoseo kaj turniĝu dekstren post la pump-stacio. Turniĝu maldekstren okcidente de la legomĝardeno. Surgrimpinte la loesan monteĝon, vi vidos la fruktarbejon de Fangĝuangvilaĝo. Rapidu, eble vi atingos lin survoje. . . .”

Dum la knabino parolis, ankaŭ kelkaj maljunuloj intermetis, varme klarigante al mi la aspekton kaj vestojn de la sekretario. Tamen mi aŭskultis ne atente, ĉar la aspekton de komunuma sekretario mi ja povis mem elimagi!

Tial mi dankis ilin kaj iris laŭ la vojo montrita de la knabino per plirapidigitaj paŝoj.

Post la irado de pli ol unu lio* mi vidis iun kaŭranta apud la vojo. Li estis pli ol tridek jarojn aĝa, vestite kiel vilaĝa kadro. Liaj ŝuflankoj kaj la krurpartoj de lia pantalono estis makulitaj de koto. Videble li estis ĵus laborinta. Kun longa ĉasa fusilo apoganta en lia sino, li kaŭris tie ĝuste kontraŭ kotonarbeto enpensiĝinta, kvazaŭ esploranta la kreskadon de la koton. Kredeble li estis sekretario H'ang mem. Mi pensis kun admiro: "Kiel modesta sekretario H'ang estas! Jen prifierinda kadro deveninta de laboranta kamparano!"

"Kamarado . . . kamarado H'ang, ĉu vi estas sekretario H'ang?"

Aŭdinte mian vokon, la homo alturnis sian rigardon kaj okulmezurinte min diris kun rideto: "Vi pravas, pravas. . ."

"Sekretario H'ang, mi . . ." Mi estis jam prezentonta min mem, kiam la homo daŭrigis: "Pravas nur duone!" Li estis fakte balbutulo.

"Kion tio signifas?"

"Mi — mi estas nomata H'ang, sed — sed ne sekretario!"

Post tio li demandis de kie mi venis kaj pro kio mi serĉas sekretarion H'ang. Post kiam mi diris ĉion al li, li varme premis mian manon kaj sin prezentis: "Mi, mi estas vicedirektoro de la komunumo." Li ankoraŭ diris al mi, ke ĵus sekretario H'ang unue plugis teron tie kun la komunumanoj, poste venis ĉi tien por esplori la kreskadon de la kotonplantoj kaj doni instrukciojn pri la mezstadia zorgo pri ili kaj fine iris al Fangĝuang-vilaĝo. Parolante ĝis tio, la vicedirektoro fingre montris al la sudo kaj diris: "Nun li — li ne povas transiri la loe — loesan monteton. Ra — rapidu por kuratingi lin, li. . .". La vicedirektoro ankoraŭ volis diri ion, sed mi jam ne povis finaŭskulti ĝin.

Alveninte al la loesa monteĝo, mi trovis nenian signon de sekretario H'ang. Antaŭ mi estis nur maljunulo puŝanta ĉaron. Li estis vestita kiel tipa veterana kamparano, kaj porti surkape eluzitan pajlĉapelon, sub kies rando vidiĝis haroj griziĝintaj. Sur unu el liaj ŝultroj estis ĉina jaketo dubeflava. Malantaŭe de la talio estis enmetita longa pipo, kun la tabakujo pendolanta ĉe la postajo. Dezirante informiĝi de li pri sekretario H'ang, mi rapidis ĉe lian flankon per kelkaj paŝoj.

"Samlokano," mi demandis, "kien vi iras?"

"Al Fangĝuang-vilaĝo. Kien vi iras, junulo?"

"Ankaŭ al Fangĝuang-vilaĝo."

"Nu, lasu min profiti vian laborservon." Tion dirinte, li delasis la ĉaron, ligis al ĝi ŝnuron, li levis al mi la liberan finon kaj diris ridante: "Venu, junulo, donu helpon. La vojo antaŭ ni estas nefacila."

Mi povis fari nenion alian ol transpreni la ŝnuron kaj komenci tiri la ĉaron. Kiam la ĉaro ekmoviĝis, li tuj demandis al mi de kie mi venis, kien mi iras, pri kio mi okupiĝas, kio estas mia nomo, kiom da jaroj mi havas. . . . Mi respondis al li punkton post punkto. Krom demandi li nur nu-is, sed diris nenion.

Post kiam li findemandis, mi ekdemandis lin:

"Samlokano, ĉu tio en la sakoj estas greno?"

"La greno por greno."

"Ĉu fekaĵo?"

"Moderna fekaĵo."

"De kie vi alveturigis ĝin?"

"De tiu vojkruciĝo."

"Ĉu aĉetita?"

"Ĉiel ajn ne ŝtelita."

"Ĉu vi transportas ĝin por aliuloj aŭ por vi mem?"

"Kaj por aliuloj, kaj por mi mem."

Kial tiu ĉi homo havas neniun seriozan vorton? Mi estis miranta, kiam okazis kio min pli mirigis.



Ilustraĵoj de Ĉen Hievej

* 1 lio = $\frac{1}{2}$ kilometro

Anstataŭ esti dankema al mi, kiun li devigis labori por li senpage, li ankoraŭ kritikis min de tempo al tempo:

“Junulo, al vi mankas ‘fundamentaj ekzercoj’. — Ah, ne ĝustamaniere! . . . Vi ne komprenas? Mi diru al vi — Malaltigu la talion, elstarigu la bruston, plielstarigu ĝin. Levu la kapon, kaj rigardu antaŭen. Kial vi rigardas la piedpintojn? Neniu ilin forŝtelos! . . . Ankoraŭ ne bone — Pli forte skuadu la ŝultrojn, svingadu la brakojn, svingu kun pli multe da forto. . . . Farante ‘fundamentajn ekzercojn’, vi devas havi korektan teniĝon, alie vi neniam sukcesos!”

Kiam ni eniris Fangĝuang-vilaĝon, preskaŭ jam estis tagmezo. La komunumanoj ĵus finis sian matenan laboron. Vidinte nin, kelkaj viroj alproksimiĝis de ĉiuj anguloj kaj varme nin salutis. Iu junulo, kiu sukcesis la unua alrapidi antaŭ nin, diris al la ĉarpuŝanto:

“Hiangĉjo, nu, vi ambaŭ delasu la ĉaron. Lasu min puŝi ĝin. Portu por mi la ŝpaton.”

Hiangĉjo ne rifuzis. Li delasis la ĉaron kaj transprenis lian ŝpaton. Ĵetinte rigardon al la ŝpatklingo, li diris:

“Ferbulo, rigardu la ŝpaton, kiun vi uzas. Krom rusto, sin trovas nur koto. Kiel ĝi povas atesti honestan laboron! Se via patro ankoraŭ vivus, li riproĉus vin kiel ‘sentaŭgulon’.”

Naive ridante, Ferbulo diris nenion. Post momento, li demandis: “Ah, Hiangĉjo, kion vi sendas al ni?” Dirante tion, li surmetis la ĉarrimenon sur siajn ŝultrojn, sin klinis kaj levis la timonojn.

“Kion vi ĝuste nun bezonas!” respondis Hiangĉjo, ĵetante rigardon al Ferbulo kaj ekkriis: “Ferbulo, haltu!”

“Pro kio?”

“Mi diris ke vi haltu!”

La ĉaro haltis. Hiangĉjo alproksimiĝis al li kaj diris: “Denove malkovriĝis via falsa farĉo. En tiu ĉi laboro ankoraŭ mankas al vi ‘fundamenta ekzerco’. Ne tenu la timonojn ĉe la mezo. Ju pli proksime de ilia fino, des pli facile. . . .” Dirinte tion, li ekfrapis sur la sunbrunigita dorso de la junulo kaj diris: “Estas nature ke vi ĝis nun ankoraŭ ne trovis amatinon. Pro tia fuŝlaboro, ankaŭ mi ne volus edziniĝi al vi, se mi estus knabino.” Ĉiujn ridigis liaj vortoj.

Tiam alproksimiĝis iu avino, kiu diris al Hiangĉjo:

“Jen vi, knabo, denove tiel ŝvitegas kiel koko elakviĝinta. Iru kun via onjo por tagmanĝi.”

Malproksime en la oriento ekkriis ankaŭ iu virino:

“Hiangĉjo, venu manĝi ĉe ni!”

En la okcidento, alia maljunulino, verŝajne aŭdinte la krion, rapideme eliris kaj kaptante per mano la pordfoston diris ordone:

“Hiangĉjo, iru al neniu alia hejmo! Venu al mi kaj mi havas laboron por vi.”



Depreninte la pajlĉapelon, Hiangĉjo sin ventumis per ĝi kaj ridante salutis la avinon ĉe la pordo:

“Bone, onjo Vang. Mi tagmanĝos ĉe vi hodiaŭ. Iru pretigi la manĝon. Unue mi iras al la oficejo de la brigado.”

“Ne, venu al mia hejmo!”

“Nepre al mia hejmo!”

“Onjo, ĉu mi povus satiĝi por la tuta vivo per unu sola manĝo? Kial malpacienti!” Dirante tion, Hiangĉjo antaŭen iris ridante.

Post momento aro da “petolemuletoj” lin ĉirkaŭis. Iu tiris lian zonon, alia ĉirkaŭprenis lian femuron, kriante en konkuro:

“Oĉjo Hiang, nin regalu per rakontoj!”

“Se vi ne rakontos, ni ne lasos vin foriri!”

Ridetante kun duonfermitaj okuloj, Hiangĉjo palpilis iliajn kapetojn kaj diris:

“Bone, mi rakontos vespere. . . .”

“Ne, rakontu jam nun!”

“Nu, mi tuĵ rakontos.” Tion dirante, Hiangĉjo kaŭriĝis inter la geknaboj, eksvingis la manon kaj komencis rakonti. Lia rakonto estis tiel interesa, ke la geknaboj ĉiuj brue ridis. Profitante la ŝancon, li ŝteliris en flankan strateton.

Subite mi ekmemoris ion kaj demandis al iu kadro de la brigado kiu estis apud mi: “Kamarado, kie estas k-do Hiang, la sekretario de la komunumo?”

“Por kiu vi ĵus tiris la ĉaron? Tiu ja estas la sekretario de la komunumo! Ĉu vi ne konas unu la alian?”

“Li estas la sekretario de la komunumo?”

“Jes, iru, mi akompanos vin por lin trovi.”

Dum la irado, mi denove lin demandis: “Ĉu la ĉarpuŝinto estas sekretario Hiang de nia komunumo?”

“Jes, li mem.” Kredeble li divenis kion mi pensis kaj aldonis: “Ne juĝu nian Hiangĉjon laŭ lia aspekto. Neordinaran kapablon li havas, kaj en manipulo de plugilo, kaj de pafilo, kaj de la skribilo. . . .”

“Ĉu li estas lerta en ĉio ĉi tio?”

“Jes ja!” li respondis. “Estante dekkvarjara li jam komencis labori kiel dungituleto, kaj estante iom pli ol dudekjara li jam fariĝis lertulo en terkulturado. Sed nur unu afero: li ne bone laboris. Poste li estis forpelita de la bienulo. . . . Kiam ni batalis kontraŭ la diabloj (la japanaj invadintoj — la trad.), li partoprenis en la ĉiloka gerila milito kaj estis kromnomita ‘Diamanta Borilo’ pro eksterordinara lerto en pafado. Iufoje li mortpafis ses malamikojn per tri kugloj. Tre fame konata li estis. Post la Liberiĝo pli graviĝis la uzo de la skribilo. Tial li penis lerni. Li povas nun ne nur skribi kaj kalkuli, sed ankaŭ verki artikolojn por la ĵurnaloj. . . .”

“Vere neordinare!”

“Jes ja! Kiam li lertiĝis en uzo de la skribilo, li tamen ne formetis la plugilon, nek la pafilon.” Ju pli multe li parolis, des pli ekscitita li fariĝis. “Hiangĉjo ĉiam diris al ni, ke en socialisma konstruado, neniun el la ‘tri iloj’ estas mankebla. Precipe por tiuj kiuj gvidas agrikulturan produktadon, solidareco kun la plugilo estas precipe necesa!”

Alveninte la oficejon de la brigado, mi tamen trovis neniun en la domo. Subite aŭdiĝis el la najbara domo rideksplodoj. La kadro de la brigado fingromontris tien, de kie venis la rideksplodoj, kaj diris: “Li ree vizitas sian instruiston.”

“Instruisto? Kia instruisto?”

“Instruisto pri terkulturado. Avo Hju estis malriĉega en la pasinteco kaj li nun amas la komunumon kiel sian hejmon. Li estas sperta en ĉiu ajn laboro de terkulturado. . . . He, Hiangĉjo, oni volas vidi vin!”

Ĉesis la ridado kaj eksonis laŭtaj paŝoj. Kiu kuraĝus diri laŭ la paŝsono, ke la venanto estas homo kun aĝo de duona cento da jaroj!

En palpebruma daŭro aperis sekretario Hiang antaŭ ni. Nun li estis vestita same kiel survoje, sed ŝajnis al mi multe pli alta ol antaŭe. Mi alproksimiĝis al li kaj respektoplene salutis lin per “kamarado sekretario”. Post tio mi min prezentis. Sed apenaŭ mi estis dirinta kelkajn vortojn, kiam li min ĉesigis, dirante:

“Ĉu ĉion tion ĉi vi ne jam diris al mi survoje?”

“Ho, jes, mi forgesis, kamarado sekretario Hiang.”

“Ne gravas. Sidiĝu, kamarado propagandisto Cuj.”

“Mi ne lacas, kamarado sekretario Hiang. Sidiĝu vi mem!”

“Ankaŭ mi ne lacas, kamarado propagandisto Cuj. Vi sidiĝu!”

Per siaj senĉesaj “kamarado propagandisto Cuj”, li vere embarasis min, kaj mi diris: “Kamarado sekretario Hiang, nomu min per ‘Cujĉjo!’”

“Kamarado propagandisto Cuj, se vi povas nomi min per mia ‘oficiala titolo’, kial vi ne permesas al mi nomi vin per la via?” ekridis sekretario Hiang.

“Neeble, mi ne ĉasas trograndan profiton, sed ankaŭ ne ŝatas malprofiton!”

“Per kio do mi nomu vin?”

Sekretario Hiang unu paŝon pliantaŭeniĝis kaj ekfrapante mian ŝultron diris ridante:

“Nomu min per ‘Hiangĉjo’. Kiel lakone! Ĉu ne, Cujĉjo?”

Mi ridis kun ĝojo.

Tiam aŭdiĝis de la strato voko de maljunulino:

“Hiangĉjo, venu tagmanĝi!”

Sekvante Hiangĉjon, mi do iris al la hejmo de onjo Vang.

Ni tagmanĝis ĉe ŝia hejmo. Antaŭ ol la manĝo estis finita, la domo jam pleniĝis je homoj, viroj kaj virinoj, junaj kaj maljunaj, kadroj kaj komunumanoj. Iuj parolis pri laboro, aliaj rakontis siajn hejmajn bagatelojn, kaj ankoraŭ aliaj babilis al Hiangĉjo pri la unumonata datreveno de la naskiĝtago de sia infano aŭ la naskiĝtago de sia patrino. La diversvoĉa bruado estis tiel granda kvazaŭ ĝi levpuŝus la tegmenton. Finfine onjo Vang diris: “Ĉu vi ne volas permesi al Hiangĉjo iom ripozi? Tuj foriru!” Ĉiuj foriris kiel petite.

Post kiam ili foriris, Hiangĉjo ekfrapis sur ligna tabulo apud la muro kaj diris al mi: “Cujĉjo, ripozu ĉi tie!” Tion dirante, li ekprenis ŝtipon kaj ĝin transdonante al mi diris: “Jen via kapkuseno. Nek tro dika, nek tro maldika, ĝi ĝuste taŭgas.” Forironte, li prenis de sur verga grenujo grandan tifafolian ventumilon kaj donis ĝin al mi, kvazaŭ li estus la mastro de tiu domo.

“Por kio vi iras?” mi demandis.

“Mi iras eksteren. Dormu!”

Tiam rapide elkuris onjo Vang el la interna ĉambro, kriante: “Hiangĉjo, ĉu vi denove eliras por rondviziti? Nepre ne! Hodiaŭ estas tiel varmege, tamen ripozi vi ne volas, ĉu do morton vi deziras!” Kvazaŭ ne aŭdinte tion, Hiangĉjo eliris ridante. Murmurante la maljunulino kuris ĝis la pordo kaj devis reveni ankoraŭ murmurante: “Kvazaŭ kuniklo, la knabo tuj malaperis post eliro el la pordo!” Enirinte la ĉambron kaj vidinte, ke mi kuŝas sur la glata tabulo kun kapo sur la ŝtupo, ŝi ekmanklakis kaj diris ridante: “Kamarado, vi vere estas metilernanto de Hiangĉjo!” Dirante tion, ŝi iris en la internan ĉambron kaj revenis kun mato, litaĵo kaj kapkuseno.

Mi vere laciĝis de irado, ke mi endormiĝis tuj post kuŝiĝo. Kiam mi vekigis, jam pasis duono de la posttagmezo. Mi leviĝis kaj serĉis Hiangĉjon, kaj komunumanoj diris, ke li delonge iris labori en kampo. Kiam mi venis al la kampo, verŝajne oni jam laboris longan tempon kaj Hiangĉjo estis sidanta kaj babilanta kun la komunumanoj sub saliko.

“Efektive, se vi ne laboras por kelkaj tagoj, eĉ dorneto sub via korpo povas ĝeni vin. Sed se vi kuŝiĝas sur maiztigoj bone laborinte, tiam estas senkompare komforte por vi. . . .” diris iu komunumano.

“La proverbo bone diras: Post ŝvitlaboro streĉa, sub arbo ombroŝarĉa, jen ĝuo vere reĝa!” diris alia.

“Pri tio Hiangĉjo havas sian sperton,” intermetis ankoraŭ alia komunumano. “Tun fojon, li iris al la guberniurbo kaj havis kunvenon por duona monato. Post la reveno li sin okupis pri esplorado kaj transsciigo kaj ne povis partopreni en la kampa laboro eĉ unu tagon. Mia patro, kiu estas kuiristo de la komunumo, vidinte ke lia apetito multe pli malboniĝis ol antaŭe, opiniis ke li estas malsana kaj preparis por li bovlon da vermiĉelo, sed Hiangĉjo ridante forpuŝis la bovlon kaj diris: ‘Efektive mi manĝas malmulte kaj estas malsana, sed vermiĉelo min ne kuracos.’ ‘Kio povos vin kuraci?’ Prenante ŝpaton de angulo de la ĉambro, Hiangĉjo respondis: ‘Verŝajne tiu ĉi mia malnova kunulo scias min bone, kaj prefere lasu mian malsanon al ĝi!’ Dirinte tion, li sursultrigis la ŝpaton kaj foriris. Post kiam li revenis de la kampoj, lia apetito efektive pliboniĝis!”

Profitante la ŝancon de la babilado, mi demandis al Hiangĉjo:

“Kian laboron mi faru?”

“Tion decidu la brigadestro,” diris Hiangĉjo ridante. Montrante al la brigadestro, li diris: “Jen, demandu al li!”

Antaŭ ol mi komencis demandi, la brigadestro diris meminitate: “Cujĉjo. Vi laboras la unuan fojon. Mi asignu al vi malpezan laboron.” Montrante al puŝĉaro, li diris: “Resendu ĝin al Heĝuang-vilaĝo.”

“Ĉu ĝi ne estas la ĉaro, per kiu ni alportis kemian sterkon?” mi demandis. “Kial ni devas puŝi ĝin al Heĝuang-vilaĝo?”

“La kaŭzo estas,” klarigis la brigadestro, “ke ni uzis revenantan ĉaron de Heĝuang-vilaĝo por transporti nian kemian sterkon de la guberniurbo. Hodiaŭ antaŭtagmeze, kiam la brigadestro de Heĝuang estis puŝanta la ĉaron ĉi tien, li renkontis Hiangĉjon survoje. Hiangĉjo diris: ‘Mi ĝuste iras al Fangĝuang-vilaĝo. Ĉu vi volus lasi al mi la laboron!’ ‘Kiel pri la ĉaro?’ ‘Ĉivespere mi iros al via vilaĝo kaj mi repuŝos ĝin al vi.’ Sed post kiam li alvenis al ni, Hiangĉjo trovis problemojn en nia labor-administrado. Ni petis lin loĝi ĉe ni ĉi-nokte por helpi nin studi la problemojn. Por ke la frata brigado ne estu malhelpata en en la uzado de la ĉaro, bonvolu foje vin penigi!”

“Bone, Cujĉjo servu provizore kiel transportisto. Ĝi estas ‘fundamenta ekzerco’ por via propaganda laboro.” Hiangĉjo diris ridante kaj eksvingante la manon al ĉiuj li daŭrigis: “Ni eklaboru! La suno urĝas nin!” Li la unua ekprenis la ŝpaton.

DEMJAN BEDNYJ:

Kiam Mi al la Patrin' Adiaŭis

*Kiam mi al la patrin'
adiaŭis,*

*Tuta parencaro min
ekĉirkaŭis.*

*“Kien iras, kien vi?
vivan ŝatu*

*Ho, ne iru vi, pro di,
al soldatoj.*

*Ja ne timas Ruĝarme'
malamikojn.*

*Ĉu pri vi sopiras tre
bolŝevikoj?*

*Ĉu vi iras kun volont'
ĉu obeas,*

*Vanja, Vanja sen bezon'
vi pereos.*

*Pro vi havas la patrin'
grizajn harojn.*

*Restis hejme ja sen fin'
nun por fari.*

*Ja mirinde statas nun
la afero:*

*Pli grandiĝis la mastrum'
kaj la tero.*

*Al la jug' de la kampul'
venis fino.*

*Geedziĝus vi, karul',
kun Arino.*

*Vivus vi kun junedzin'
en tenero! . . .”*

*Riverencis al patrin'
mi ĝis tero.*

*Kaj al ĉiuj per kapklin'
ĉe la pordo:*

*“Ne lamentu, kvazaŭ min
trafus morto.*

*Se laŭ vi en lando nur
pensus ĉiu*

*Restus ja nenia spur'
de Rusio.*

*Venus la malnova ord'
kaj mizero,*

*Rabus teron aĉa hord'
kaj liberon.*

*Ree regus la bienul'
tute krude.*

*Suĉus sangon tiu pul'
gut-post-gute.*

*Ne al balo aŭ festen'
iras Vanja,*

*Forlasante ĉe vi jen
sian panjon.*

*Iras mi al Ruĝarme'
por milito.*

*Kaj ekĝemos, krios ‘Ve!’
parazitoj.*

Al la popo kaj kulak'
simpla vorto:*

*Per ponardo ilin — krak!
kun tutforto.*

*Vi ne cedas nin? — do for,
al diablo!*

*Lukte mem edenon por
ni establu.*

*Ne edeno por fiband'
estos tio,*

*Sed plej bela propra land'
Sovetio.”*

El la rusa trad. B.B.

*Kulako — riĉa kamparano.

LA MONGOLA LINGVO VASTE UZATA

Lernado kaj uzado de la mongola lingvo en Interna Mongolio estis multe malhelpata antaŭ la Liberigo. Sed nun la uzado kaj disvolviĝo de tiu ĉi lingvo estas speciale akcentitaj kiel unu el la ĉefaj rajtoj de nacia aŭtonomio de la mongola popolo.

Ĉiuj dokumentoj, oficialaj sciigoj de la registaroj en diversaj niveloj, kaj de aliaj instancoj inkluzive komercajn organizojn, hospitalojn, poŝtoŝtationojn, librejojn ktp. en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio nun uzas paralele la mongolan kaj hanan lingvojn. Ankaŭ diskutado en kunvenoj, teksto de la lernolibroj, diversaj verkoj, teatraĵoj, filmoj ktp. uzas same tiujn du lingvojn.

En la lasta jaro, pli ol cent kolektivoj kaj pli ol mil personoj estis premiitaj pro rimarkinda progreso en lernado kaj uzado de la mongola lingvo.

Post la fondiĝo de la aŭtonoma regiono en 1947 eldoniĝis en la mongola lingvo pli ol 2800 libroj kun preskvanto de 28,000,000 ekzempleroj. Pli ol duono de la mongolaj gejunuloj jam scipovas sian nacian lingvon. Profitante tian vastan aplikadon ankaŭ la lingvo mem multe evoluis.

PLIAJ KULTURAJ LABORANTOJ EN LA KAMPARON

Pli ol 170 verkistoj, artistoj kaj muzikistoj en Pekino iris en la kamparon ĉe la fino de la pasinta jaro por helpi la kulturajn laborojn de la popolaj komunumoj. Tio estis la dua fojo de amasa iro al la kamparo por la verkistoj en la ĉefurbo. Ili estas dividitaj en sep grupoj kaj iris al jenaj sep provincoj: Hebej, Henan, Ŝandong, Ŝanhi, Anhuĵ, Liaŭning kaj Junnan.

La Krono de Koko

(FABLO)




kriadis fiere etendante la kolon. La kokino tuttage restadis akompananta la virkokon kaj petadis de li bongustajojn. Iom post iom ili ĉesis iri eksteren por serĉi manĝaĵojn, sed postulis, ke aliaj birdoj ilin vivtenu. Ili ne plu nestis mem, sed ordonis al aliaj birdoj konstrui por ili luksan palacon. Rezulte de longtempa nenifarado, malfortiĝis iliajflugiloj, per kiuj ili jam ne povis vagi laŭplaĉe kiel antaŭe sur la vasta ĉielo; malakriĝis iliaj beko kaj ungoj, kaj ili perdis sian valoran laborkapablon. Kaj la birdoj, anstataŭ ilin aŭtoritatigi, ilin malestimis.

Tio estas la kaŭzo, ke de tiam ĝis nun la kokoj, kvankam kunflugiloj, ne povas flugi alten nek malproksimen, sed bezonas, ke la homoj konstruu por ili neston kaj donu al ili manĝi. Krom admirisian propran "kronon", ili povas servi nur kiel "bongustajo sur la manĝotablo".

EN antikva tempo, la kokoj ne havis kreston sur la kapo. Same kiel aliaj birdoj, ili loĝis profunde en arbaroj, kaj diligente laboris tra la tuta tago, mem nestante por si kaj mem serĉante por si manĝaĵojn. Kapablaj flugi alten kaj malproksimen, ili vivis liberan kaj senzorgan vivon.

Ĉar la kokoj estis laboremaj, kaj ili kuraĝe luktis per siaj akraj beko kaj ungoj kontraŭ la rabobestoj ilin atakantaj, ili gajnis grandan prestiĝon inter la birdoj, kaj ĉi tiuj unuanime elektis la virkokon sia reĝo kaj la kokinon sia reĝino, kaj donacis al la reĝo tre elegantan kronon.

Fariĝinte reĝo de la birdoj, la virkoko ekopiniis sin meritoplena kaj plej potenca en la mondo. Li elmontradis ĉie ajn siajn belajn plumojn. Kiam li paŝis, li ŝanceladis la korpon kun alte levita kapo kaj ŝveligita brusto, kaj





TUJ APEROS

Aŝma

Tradicia eposo de Sani-popolo de Ĉinio, pri la aminda knabino Aŝma kaj ŝia brava frato Ahej, kiuj heroe luktis kontraŭ maljusta forto.

Pli ol 1,500 versoj en 12 ĉapitroj kaj ilustritaj per multaj tutpaĝaj multakoloraj bildoj.

Formato: 16.5 x 19 cm., 80 p.

Prezo: £0-5-0 US\$0.70

Gld. 2.65 Rb. 0.63

EL ĈINA

FOTOGRAFIA

ARTO

111 artaj fotoj inkluzive de 14 multakolore presitaj

Formato: 23 x 25.5 cm.,

112 + 8 p.

Prezo: £0-10-0 US\$1.45

Gld. 5.30 Rb. 1.27

Eldonis la Ĉina Esperanto-Ligo, Disvendas la Libro-Servo de ĈEL, aŭ EPĈ-perantoj

LI GUONAN:

KUKOLO

(FABLO)

Mil solvojn elpensadi dum nokthoro, Maldiligenti tage kiel kukolo.

— Proverbo

Estis nokto de malfrua aŭtuno. Kukolo staris sur arbo, kuntirante ĉiujn siajn plumojn kaj profunden retirante sian kolon. Sur ĝin faladis malvarma roso, tiel ke ĝi ne povis endormiĝi.

“Kuku — eble baldaŭ tagiĝos! Kiel komforte estus al mi, se mi nun povus kuŝi en varma nesto! Ve! Ĉiuokaze, mi komencos nesti morgaŭ.” La kukolo longe sopirĝemis, retiris sian de frosto sensentigitan maldekstran piedon de sur la branĉo, kaj pene refermis la okulojn.

Matene, la unua fasko de sunradioj penetris tra la velkintaj branĉoj kaj orumis la malmultajn tremantajn kaj velkajn foliojn, kiuj ankoraŭ restas sur la arbo.

“Kuku —, kuku —, kiel bela mateno!” pensis la kukolo, forskuante la roson de sur siaj plumoj, post sufero de tutnokta frosto. “Unue mi havigos al mi abundan matenmanĝon kaj, poste, tuj komencos konstrui neston.”

La suno brilis varme. Kaj la sate manĝinta kukolo, sentante sin plezure laca, jam neniel povis sin revigligi.

“En kia formo mi konstruu mian neston?” ĝi demandis al si mem.

“Ĉu same kiel la geedzoj hirundoj, transportu koton de la malproksima lageto buŝo post buŝo al trabo de iu domo? Tia laboro estas tro laciga, kaj malpurigus miajn vizagon kaj plumojn. Eĉ se mi ne ĝeniĝus de la malkonvena metodo, ĉu konstruajo el koto povus servi longdaŭre?”

“Estas ridinda la nesto de oriolo, kiu similas al lulilo! Estas uzitaj de ŝi ne nur velkintaj folioj, sekigintaj herboj kaj maldikaj radiokoj, eĉ araneajo estas alportita kiel konstrua materialo. Ŝi verŝajne volas esti merceristino. La neston ŝi pendigis sur branĉon, tiel ke ĝi balanciĝadas senĉese dum blovado. Kiel oni povas tiel ŝerci pri sia vivo? Ne decas al mi tion fari!”

“Kaj la domo de D-ro Pego estas tro simpla. Li scias nur kuraci la malsanajn arbojn, sed ne prizorgi sin mem. Tian neston el kelke da herbaĉoj en fendo de trunko, mi certe ne konstruos imite!”

“Mi konstruos neston vastan, komfortan, belan, fortikan kaj... kompreneble en stilo plej moderna, sed sen neceso de transportado de koto aŭ velkintaj branĉoj. Mi provos la plej novan konstruprocedon, kiu estos plena de poezio, ekzemple per kantado de kuku, kuku...”

La kukolo duonfermis la okulojn, estis ravita de sia fantazio, kaj tute forgesis la froston dum la pasinta nokto.

Tamen, dum la kantado de la kukolo, la suno malsupren forŝteligis malantaŭ la okcidentan monton. Malvarma vento denove komencis tremigadi la flavigintajn foliojn ankoraŭ restantajn sur la branĉoj. Senbrue la kurteno de nokto plenkovris la teron.

La kukolo subite ekmemoris la malagrablajon en la pasinta nokto.

“Kuku —, kiel frosta veteraĉo! Ve! Morgaŭ mi certe konstruos neston, en ĉiu okazo.”

ĜANG HENG

Ĉina Astronomo antaŭ 1700 Jaroj



Ĝang Heng (78—139 p. K.) estis la plej fama astronomo en la ĉina historio. Li faris grandan kontribuon por la disvolviĝo de la ĉina astronomio per la invento de la ĉielgloba modelo kaj tertrema montrilo.

LA ĈINA ANTIKVA ASTRONOMIO

Antaŭ kelkmil jaroj, la praavoj de ĉinoj jam sin okupis pri terkulturo kaj sciis ke la ĝermado, kreskado kaj rikoltdono de plantajoj intime ligiĝas kun la ŝanĝiĝo de la sezonoj kaj vetero. Kaj por ekkoni ĝiajn leĝojn, tre frue ili jam komencis la studon pri astronomiaj fenomenoj kaj difino de kalendaro, tiel ke ili akumulis multe da astronomiaj scioj.


En Hia-dinastio antaŭ pli ol 3,700 jaroj uzata jam estis la Hia-kalendaro, kiu difinis la tempon por unu rondiro de la luno ĉirkaŭ la terglobo kiel unu monaton, la grandan el 30 tagoj kaj la malgrandan el 29 tagoj kaj difinis, ke unu jaro daŭras 354 tagojn. En la ĉina antikva libro *Ŝuging*, estis ankaŭ notite ke unu jaro konsistas el 366 tagoj. Jam en Ĝoŭ-dinastio t. e. antaŭ pli ol 3 mil jaroj, oni dividis la stelojn en 28 konstelaciojn kaj en la epoko de la Militantaj

Regnoj (480—222 a. K.), la astronomoj Gan De kaj Ŝi Ŝen jam notis pri la lokiĝo de 120 fiksjaj steloj. La plej frue registrita eklipso de la suno en Ĉinio estis tiu en la jaro 776 a. K., kaj ĉina astronomo trovis kometon jam en la jaro 613 a. K. Ĉinio estas lando, en kiu tre frue disvolviĝis astronomio.

ĈIELGLOBA MODELO

Ĝang Heng heredis la atingojn de la antikva astronomio kaj levis la tiaman astronomion ĝis nova nivelo. Ĝang Heng estis saĝa kaj tre lernema jam de la infanaĝo. Estante 16-jara li ekvojaĝis por fari rondiron tra la tuta lando. Poste li venis al la tiama ĉefurbo Luojang, Henan-provinco, kie li studis en la ŝtata lernejo kaj interamikiĝis kun multaj instruituloj. Li sin okupis precipe pri la studo de astronomio. Ekde sia 23-a jaro li fariĝis ŝtata oficisto kaj daŭre laboris kiel tia dum 37 jaroj. Li laboris plej longtempe kaj ankaŭ kun plej granda sukceso, kiel *Tajsiling*, la oficisto respondeca pri astronomia laboro.

En 117 p. K. Ĝang Heng sukcesis elfari *huntjanji*, modelo de ĉielglobo, kiu konsistis el malplena kupra globo kun diametro de 8 futoj kaj fera akso en la direkto de tiu de la ĉiela globo, t. e. ankaŭ tiu laŭ kiu turniĝas la terglobo. La globo kaj la akso interkruciĝis je du punktoj, kiuj simbolis la nordan kaj sudan polusojn de la ĉiela globo. La norda poluso estis je 36° (t. e. $34^\circ 56'$ laŭ nuna normo) super la horizonto, kio estas precize la geografia latitudo de la urbo Luojang. Sur la surfaco de la globo estis gravuritaĵ la 28 konstelacioj kaj multe da aliaj astroj. Tuj ĉirkaŭ la globo estis alfaritaj la horizonta kaj meridianaj ringoj. Duono de la ĉiela globo troviĝis super la horizonta ringo kaj duono sub ĝi. La akso, kiu servis ankaŭ kiel tenilo, estis sur la meridianaj cirklo. Krome, ĉirkaŭ la globo estis ankaŭ ekliptikaj kaj ekvatoraj ringoj, interkruciĝantaj unu la alian je angulo de 24° (t. e. $23^\circ 42'$ laŭ nuna normo). Sur la ekvatoro kaj ekliptiko estis markitaj la 24 sun-periodoj, respektive; kaj la ringoj estis dividitaj en $365\frac{1}{4}$ gradojn ekde la punkto de vintra solstico kun po 4 subgradoj. La suno moviĝas unu gradon ĉiutage sur la ekliptiko.



Klarigoj pri la Modelo de Ĉielglobo: 1. Norda poluso; 2. Ekvatoro; 3. Zodiako; 4. Meridiano; 5. Cirklo reprezentanta la horizonton; 6. Cirklo de horoj; 7. Zenito.


En la antikveco ĉinoj uzis la akvan guthorloĝon, kiu konsistis el speciala akvujo en kies fundo troviĝis

trueto, tra kiu gutadis la akvo en alian akvujojn sube lokitan. El la akvonivelo de tiu ĉi akvujo oni povis informiĝi pri la tempo. Por ke la ĉielgloba modelo povu aŭtomate sin turni, Ĝang Heng ligis la modelon kun guthorloĝo, per kies gutado de akvo estis movata la dentrado, kiu turnis la ĉielglobon je unu turniĝo ĉiutage, Tiamaniere li sukcesis igi la astrojn gravuritaĵajn sur la globo aŭtomate prezentiĝi laŭ tempopaso konforme al la moviĝo de la naturaj steloj. Rigardante al la modelo, oni jam povis scii kiuj steloj nun leviĝas de la oriento, kiuj venas jam plej alte sur la firmamento kaj kiuj steloj nun subiras al la okcidento, k. a. Krome, li alfaris ankaŭ instrumenton ligitan kun la modelo nomata rotacia datmontrilo, kiu povis informi la daton kaj lunfazon.

TERTREMA MONTRILO

Dum la tempo de Ĝang Heng, ofte okazis tertremo. En 23 el la 30 jaroj de 96 ĝis 125 p. K., okazis grandaj tertremoj, kiuj alportis gravajn katastrofojn kaj teruron al la popolo. Por sufiĉe bone informiĝi pri la tertremoj, Ĝang Heng inventis en la jaro 132 p. K. tertreman montrilon—la unuan sismo'ogian instrumenton en la mondo.

Tiu instrumento estis muldita el kupro kun diametro de ĉ. 2.7 metroj kaj tre similis al granda barelo. Sur ĝi estis kovrilo kaj ĉirkaŭe estis almulditaj ok drakoj sin direktantaj al oriento, okcidento, sudo, nordo, kaj sudoriento, nordoriento, sudokcidento, nordokcidento, respektive. Ĉiu drako havis kupran globeton en sia buŝo. Kaj sur la planko ĝuste sub la drakbuŝo sidis ok kupraj ranoj kun levita kapo kaj larĝe malfermita buŝego. Se ie okazis tertremo, el la buŝo de la drako de la koncerna direkto ekfalas la kupra globeto en la buŝon de la rano kun tinto.



Aŭdinte la sonon oni povis pririgardi kaj ekscii en kiu direkto okazis tertremo. La instrumento pruviĝis tre preciza montrilo per la kelkaj tertremoj okazintaj en Luoĵang. Sed foje iu kupra globeto enfalis tinte en la buŝon de rano, tamen la tero neniom tremis. Tuj do ekdubis pri ĝia precizeco. Sed post kelkaj tagoj, venis raporto de Gansu-provinco, ke okazis tie tertremo. La loko de tertremo estis pli ol 500 km. for de Luoĵang.

MULTFLANKA TALENTULO

Ĝang Heng estis homo kun multflanka talento. Li havis tre bonan konon kaj grandajn atingojn, ne nur en studo pri astronomio, sed ankaŭ pri literaturo, kalendaro, matematiko, pentrarto kaj historio.

En astronomia teorio li opiniis, ke la ĉielo estas ronda, simila al ovoŝelo kun la tero kiel ovoflavo. La tero troviĝas interne de la ĉielo, dum la suno, la luno kaj la steloj senescepte moviĝas senĉese sur la ovoŝelo. Li opiniis, ke sur la ĉiela globo estas ekliptiko kaj ekvatoro. Tiu lasta kvazaŭ zono ĉirkaŭas ĝin en la mezo laŭ la direkto de oriento-okcidento kaj estas 90° for de la suda kaj norda polusoj. Li konis ke la luno mem ne elsendas lumon kaj ĝia lumo estas nur reflektado de la sunbrilo. Li prave klarigis pri la eklipsoj de la suno kaj luno.

En la literatura sfero, surbaze de sia farita vojaĝo, li verkis dum dek jaroj la faman verkon *Kanto pri la Du Ĉefurbo*, kies apero donis veran sensacion al la tiamaj literaturaj rondoj.

Ankaŭ en matematiko li faris eminentan kontribuon: Siatempe li jam kalkulis kaj konkludis ke la koeficiento de la longo de cirkonferenco kontraŭ la diametro estas 3.1622, kiu estas sufiĉe proksima al 3.1416.

Kaj li estis ankaŭ unu el la ses tiam plej famaj pentristoj.

Pro sia justama karaktero, li estis depuŝita de la burokratoj kaj nobeloj, kaj fine kun ĉagreno li mortis malsane en 138 p. K.

Tiu antikva sciencisto estas ege estimata de la ĉina popolo. En 1955 la ĉina poŝto emisiis memorigan poŝtmarkon pri li. En 1956 estis renovigitaj en Nanĵang-gubernio lia tombo kaj la lego-teraso post ĝi. Oni alkonstruis belan muron ĉirkaŭ lia alta tombo kaj ankaŭ kioskon super la du monumentaj ŝtonplatoj antaŭ la tombo. Krome estis nove starigita ankaŭ alia memorŝtono antaŭ lia tombo, kun surskribo de Kuo Mojo, la prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, kiu legiĝas jene:

“Tia ĉiufanke disvolvita persono, kia li, estis tre malofta eĉ en la monda historio.

Li estu admirata por miloj kaj dekmiloj da jaroj!”



8. Venko kaj Malvenko

FINO DE LA LUDO — Kiam sur la vejĉi-tabulo troviĝas jam neniu libera punkto inter la teritorioj de la du flankoj, tiam finiĝas la ludo.

VENK-JUGO — Por juĝi kiu flanko venkis en la ludo oni devas kompari la grandecon de la teritorioj de la du flankoj. Por tion fari troviĝas du manieroj.

1) **KOMPARI LA ENFERMITAJN LIBERAJN PUNKTOJN** — Ĉar en la ludo la du flankoj metas ŝtonojn alterne. Tial ili uzis preskaŭ saman nombron da ŝtonoj en la ludo. Sekve estas sufiĉe kompari nur la liberajn punktojn enfermitajn de la metitaj ŝtonoj de ambaŭ flankoj.

Venkis tiu flanko, kiu havas pli da liberaj punktoj. Kaj la venkon oni esprimas per la nombro de la superaj liberaj punktoj. Ekzemple, se la nigra flanko havas 26 liberajn punktojn, kaj la blanka flanko, 30 liberajn punktojn, tiam oni diras, ke la blanka flanko venkis je 4 liberaj punktoj (ŝtonoj).

Por tion fari oni devas unue en la ludo konservi aparte la forkaptitajn ŝtonojn, kaj due post la ludo remeti ilin sur liberajn punktojn en la teritorio de la respektivaj flankoj.

2) **KALKULI LA KRUCIĜOJN DE LA OKUPITAJ TERITORIOJ**

— Ĉar la tuta nombro de la kruciĝoj sur la vejĉi-tabulo estas 361. Se la lasta ŝtono de la ludo estas nigra, do la nigra flanko devas okupi 181 kruciĝojn, kaj la blanka, 180 kruciĝojn; kaj se la lasta ŝtono estas blanka, tiam ĉiu el la du flankoj devas okupi $181\frac{1}{2}$ kruciĝojn. Venkis tiu flanko, kiu okupis pli multe ol la difinita nombro. Alie ĝi malvenkis.

Por la dua maniero ne estas necese konservi aparte la forkaptitajn ŝtonojn. Tial ĝi estas vaste aplikata de la ĉinaj vejĉiistoj.

9. Resumo de la Fundamentaj Reguloj

1) La vejĉi-tabulo estas formita el po 19 horizontalaj kaj vertikalaj linioj. Kaj sur la kruciĝoj de la linioj oni faras la ludon.

2) La ŝakpecoj de vejĉio estas nomataj "ŝtonoj". La ŝtonoj de unu flanko estas nigraj, kaj de la alia, blankaj.

3) La nigra flanko komencas la ludon.

4) La ludo progresas per alterna metado de la ŝtonoj sur la liberajn kruciĝojn (punktojn).

5) Kiam iu(j) ŝtono(j) estas enfermita(j) de la kontraŭa flanko kaj ĉirkaŭ ĝi (ili) restas neniu libera punkto, tiu(j) ŝtono(j) estas forkaptita(j).

Korektoj

En la diagramoj de tiu ĉi rubriko de la lasta numero troviĝas gravaj eraroj. Vole ilin korektu jene:

1. En la diagramoj 28, 29 kaj 30, G3 devas esti nigra anstataŭ blanka.

2. Nigra ŝtono devas esti aldonita sur D19 de la Diag. 29.

3. Blanka ŝtono devas esti aldonita sur O17 de la Diag. 29.

6) Estas malpermesate meti ŝtonon sur punkton, kiun enfermis ĉiuflanke la kontraŭa flanko, ĉar tiam restas neniu libera punkto ĉirkaŭ la metita ŝtono, krom se tiu ĉi punkto estas la lasta libera punkto de la kontraŭa flanko kiel estas priskribite en la lasta paragrafo.

7) Tial por garantii la sekurecon de la metitaj ŝtonoj, oni devas konservi almenaŭ du liberajn punktojn, kien ŝtonon meti ne estas permesate (kiam ili alprenis formojn de du apartaj okuloj) aŭ kien ŝtonon meti minacas sian propran lastan liberan punkton (en kazo de "eterna kontraŭstaro").

8) Malpermesata estas en vejĉio ankaŭ ripeta minaco.

9) Ĉe la fino de la ludo, oni kalkulas la okupitajn teritoriojn de la du flankoj (praktike "de unu flanko" sufiĉas). Venkis tiu, kiu okupis pli da punktoj ol la kontraŭa flanko, kaj la venka rekordo estas esprimita per superaj punktoj (ŝtonoj).

Nova poemkolekto:

ELEKTITAJ POEMOJ DE TO-HUIJ

EL LA VJETNAMA ORIGINALO TRADUKIS
DAO-ANH-KHA

Eldonis Ŝtata Fremdlingva Eldonejo, bele presita sur bona papero. Antaŭparolo de prof. Dang-thai-Mai, prezidanto de Vjetnama Federacio de Literaturo kaj Belartoj. Mendeble ĉe SUNHASABA, 32 Hai-ba-trung, HANOJO, Vjetnamio (via Pekino).

Malĝojo de Filo

Filo de riĉulo, kiu kutimis vivi lukse kaj senfare, kvankam jam tridek-jara, ankoraŭ devis sin vivteni per la posedaĵo de sia patro.

La patro havis jam kvindek jarojn. Iutage ili renkontis sortodiveniston, kaj tiu ĉi antaŭdiris, ke la riĉulo povos vivi ĝis sia okdek-a jaro, kaj la filo ĝis sia sesdekdu-a.



“Ve al mi, ke la patro vivos nur ĝis la okdek-a jaro,” diris la filo larmante. “Kiam mi atingis la aĝon de sesdek jaroj, kiu min vivtenos dum la postrestaj du jaroj?”

Granda Bedaŭro

Drinkemulo songis ke iu donacas al li bonan brandon kaj li tuj petas sian edzinon ĝin varmigi, ĉar li ne ŝatas ĝin drinki malvarma. Sed ĝuste ĉe tio li vekiĝis.

Sopire li diris al si: “Mi preferus ĝin drinki malvarma se mi sciis, ke mi tuj vekiĝos!”

Antaŭvido



Maldiligentulo ekfalis survoje pro malatento. Li stariĝis kaj iris pluen, sed falis denove. Kuŝante sur la tero li ne plu sin levis, kaj pentis: “Se mi sciis ke mi ree falos, mi ne devus stariĝi lastfoje.”

* KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

NOVELARO POR KAMPARANAJ LEGANTOJ

Eldoniĝis en la lasta decembro *Novelaro por Kamparanaj Legantoj*. Ĝi estas kompilita de speciala komisiono organizita de la Unuiĝo de Ĉinaj Verkistoj en marto, 1962.

En la tri-voluma novelaro estas kolektitaj 39 noveloj de ĉinaj verkistoj en la lastaj 20 jaroj.

Noveloj de la unua volumo priskribas la batalojn en la kamparo dum la nov-demokratia revolucio en Ĉinio. En la dua volumo oni legas novelojn dediĉitajn al la armitaj bataloj de la ĉina popolo. Kaj novelojn pri la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado oni trovas en la tria volumo.

POPOLAJ KOMUNUMOJ EN FILMO

Unu dokumenta filmo kun la titolo *Sur la Vojo de la Popolaj Komunumoj* estas farita de la Centra Dokument-filma Farejo en Pekino ĉe la fino de la lasta jaro.

La filmo registris la grandan ŝanĝon de Vugong-vilaĝo de

Hebej-provinco. Ĝi demonstras kiel unu el la plej fruaj kamparanaj interhelpaj grupoj fonditaj antaŭ 20 jaroj, fariĝis prospera popola komunumo. Tie 60% de la plugado estas plenumata per traktoroj. Elektra energio estas vaste uzata por irigacio, rikolto, grenprilaborado kaj prilumado. Progreso de aliaj populaj komunumoj ankaŭ estas registritaj.

TEATRAĴO KUNLUDITA DE KOREAJ KAJ ĈINAJ AKTOROJ

Antaŭ nelonge prezentiĝis en Pekino danc-dramo *Ruĝa Flago* spegulanta la bataladon kontraŭ japanaj invadintoj. Ĝi estis kune ludata de koreaj kaj ĉinaj dancistoj. La ĉefa rolo estis ludata de korea merita artisto *Chang Woong Hwan*, kaj la akcesorajn rolojn ludis ĉinaj junaj dancistoj. La prezentado rikoltis grandan sukceson.

LONGDISTANCA KONKURSO DE KOLOMBOJ

Flug-konkurso de kolomboj estas multe ŝatata lasttempe en

Ĉinio. Tio okazis ofte landskale. En la lasta decembro okazis nova konkurso de 1200 kilometroj (de Pekino ĝis Vuhan). 21 kolomboj partoprenis la konkurson. La venkinto estas “Malpeza Pluvero” sesmonata juna kolombo bredata de Jaŭ Hiaŭkuan en Vuhan. Ĝi revenis la hejmon en 15 tagoj.

VERDA MUREGO KONTRAŬ DEZERTO

En okcidenta parto de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio troviĝas tri grandaj dezertoj. Unu el ili estas Ulanbuho. Kiel aliaj dezertoj, ĝi senĉese ekspansiis al kulturata tero. En la lastaj jaroj tia ekspansio haltis antaŭ giganta verda murego el densa arbaro. La arbaro longas je 175 kilometroj kaj ĝia larĝeco varias de 300 ĝis 400 metroj. Okcidente de ĝi estas serioj da sablaj dunoj sur kiuj jam estas kreskaĵoj malhelpantaj moviĝon de la sabloj, kaj oriente de la arbaro etendiĝas vastaj kampoj kun prosperaj agrokulturaj plantoj.

SKRIBAS NIAJ LEGANTOJ

Kelkaj Proponoj

Mi pensas, ke estus bone, se en EPĈ aperus pli da artikoloj pri moroj de ĉina popolo en urboj kaj vilaĝoj kaj pri vivrimedoj de malnova Ĉinio.

Plie mi supozas, ke ankaŭ estus bone se oni presigos, kiel aspektas internacia politika situacio en okuloj de ĉinaj politikistoj kaj sciencistoj.

Ekster tio, scivolemon de la legantoj ankaŭ plenumos artikoloj pri ĉina "popola medicino", kiu estas tre fama en mia lando kaj, mi pensas, en aliaj landoj ankaŭ.

Laŭ mia opinio oni ne presu artikolojn pri gramatiko. Mi pensas ke por multaj esperantistoj ne tro gravas gramatiko sed enhavo (tio ne signifas, ke mi opinias gramatikon ne grava ĝenerale, sed nur artikoloj pri ĝi en gazetoj).

S. LOPATNIUK, POLLANDO

Bildoj el Reala Vivo

Sendube "El Popola Ĉinio" nun estas bone redaktata, sed vi havas senelĉerpitajn kulturajn fontojn, kaj la legantoj deziras trinki el tiuj bongustaj akvoĵoj. Unu bildo rakontas pli multe ol unu rakonto. La bildoj el la reala vivo: naturo, urboj, vilaĝoj kaj ilia ĉiutaga vivo, la familia vivo, ludantaj knaboj. Kompreneble vi povus elmontri tiun vastan vivregionon per diversaj manieroj.

I. GJUZELEV, BULGARIO

Forigu la Erarojn!

Estimata S-ro Redaktoro,

1) Sur la du bildoj de la paĝo 222-a de via revuo *El Popola Ĉinio* (en 1963) la du birdoj ne estas strigoj (*strix aluco*), sed gufoj

(*bubo maximus*) kun du kornetoj de plumoj.

2) Sur la unua kaj la dua bildoj de la paĝo 223-a de la sama numero la birdoj same ne estas strigoj, sed gufoj.

3) Sur la unua kaj la tria bildoj de la sama paĝo la tri bestoj ne estas talpoj (*Talpa europaea*), sed kampaj musoj (*mus rusticus*).

4) Sur la tria bildo de la sama paĝo la legomoj ne estas faboj (*uieia faba*), sed terpomoj (*solanum tubersum*).

Do, dezirinde estas, ke vi forigu la erarojn!

Miajn bondezirojn!

N. DOLIEVA, BULGARIO

RIMARKO DE LA REDAKCIO:

Pri tiuj eraroj nin rimarkigis ankaŭ s-anoj E. Joseph kaj Charles Gantier el Francio kaj s-ano Géza Kovács el Hungario. Anstataŭ "talpo" s-ano Géza Kovács proponis "zizelo"-n.

Antaŭ ĉio ni esprimas niajn tutkorajn dankojn al tiuj s-anoj,

kiuj tiel zorgeme tralegis nian gazeton kaj tiel helpeme montris la erarojn al ni, ke ni forigu la erarojn kaj uzu la ĝustajn estonte.

Jes, la nomita "talpo" devas esti "kampa muso". Fakte ankaŭ en la ĉina lingvo ĝi estas tiel nomata. Laŭ faka vortaro ĝia scienca nomo estas *Mus Tanezumi*. Hazarde ankaŭ "talpo" portas la saman nomon en ĉina lingvo krom ĝian propran. Tiel en la artikolo, la nomo estis misuzita.

La birdo kiu manĝas kampan muson, estas nomata en la ĉina lingvo "kato-kapa akcipitro" laŭ ĝia formo. Ĝia scienca nomo estas *scops semitorques*. Ĝi pli similas al gufo (*bubo maximus*) ol al "strigo". Tial estas tute dece ĝin nomi en Esperanto "gufo". *Zizelo* (*spermophilus cicillus*), verŝajne estas muso *alispeca*.

Pri la manĝaĵoj de la kampa muso en la tria bildo sur paĝo 223 kulpas la klarigo. Ĉar tiam la kampa muso nenion "manĝas", sed "estas iranta al la manĝotaj faboj". La iom granda bulo, kuŝanta sub la buŝo de la muso estas nur terbulo.

Ni ankoraŭfoje dankas la kvar gesamideanojn kaj esperas, ke ĉiuj niaj legantoj donos al ni bonvolajn kritikojn same kiel la kuragiĝojn.

NOVAJ ESPERANTAJ POŝTKARTOJ

1) ORFIŜOJ

14 pk. multakolore
presitaj. Prezo:
£0-1-0 US\$0.15
Gld. 0.50 Rb. 0.16

2) LIGNO-GRAVU- RAĴOJ PRI HOMOJ

14 pk. multakolore
presitaj.

P. M.

MENDU ĈE

Libro-Servo de la
Ĉina Esperanto-Ligo
aŭ EPĈ-perantoj



LEKCIO PRI ESPERANTO EN LA ĈINA POPOLA UNIVERSITATO

K-do Hujucz, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, faris je la 8-a de jan., ĉijare lekcion pri Esperanto al anoj de du Esperanto-kursoj en la Ĉina Popola Universitato. Anoj de unu kurso estas instruistoj de fremda lingvo el diversaj universitatoj kaj institutoj en Ĉinio, kaj anoj de la alia estas studentoj de la ĵurnalisma fakultato de la Ĉina Popola Universitato.

K-do Hujucz parolis pri la kreiĝo kaj utilo de Esperanto. Li diris, ke Esperanto publikiĝis en la jaro 1887, la lasta parto de la 19-a jarcento, kiam jam komenĉiĝis la epoko de imperiismo kaj proleta revolucio. En tiu ĉi epoko, estas objektiva bezono de internacia helpa lingvo, por ke la subpremataj popoloj unuiĝu kontraŭ siaj subpremantoj. La kreinto de Esperanto, d-ro Zamenhof, kvankam ne revoluciulo, tamen, vidinte de sia infanaĝo malgrandskalan internacian buĉadon instigitan de la cara politiko de divido kaj regado, ege sentis la bezonon de komuna lingvo inter malsamaj nacioj por interkompreniĝo kaj pro tio sukcesis krei la facile lerneblan internacian helpan lingvon Esperanto por la komunaj popolanoj.

K-do Hujucz parolis ankaŭ pri la utileco de Esperanto en faciligado de la lernado de fremdaj lingvoj, pri la helpo kiun ĝi povus doni al la studado de la gramatiko de la ĉina lingvo kaj la servo kiun ĝi povus doni al ĵurnalistoj.

La kursanoj estis inspiritaj al pli celklara kaj diligenta lernado de la lingvo.

La kunvenon ĉeestis krom la studentoj de la E-kursoj, ankaŭ la estro de la ĵurnalisma fakultato kaj kelkaj studentoj ne lernintaj Esperanton.

OTNATLUKSŬA

Z-FESTO EN LOKAJ GRUPOJ

Informoj pri Z-festo ĵus venis el la lokaj grupoj de Vuhan kaj Ĝengĝoŭ. En la sama vespero de la 15-a de dec., 1963, tiuj du grupoj okazigis kunvenon de siaj membroj por festi la komunan feston de la esperantistoj.

En Vuhan, ĉefurbo de Hubej-provinco, la festa kunveno okazis en la Urba Kultura Klubo. Ĉeestis sume 32 geesperantistoj. Krom rememorajn parolojn pri Zamenhof, oni faris tie ankaŭ raportojn pri esperantaj kursoj ĵus finiĝintaj, pri spertoj de esp-lernado kaj la ortografio de propraj nomoj en Esperanto.

La Ĝengĝoŭ-aj k-doĵ aranĝis tre intimecan kunvenon por la Z-festo. Ili parolis pri D-ro Zamenhof, pri la lernado kaj ankaŭ pri ilia agadplano en la kuranta jaro. Aranĝita de ili estis ankaŭ malgranda ekspozicieto de E-libroj eldonitaj en Ĉinio.

BILDVORTARO EN ESPERANTO

“Esperanto Press” en Kanado intencas eldoni bildvortaron en Esperanto laŭ la germana bildvortaro *Duden Bildwörterbuch*. Ĝi entenas 368 moderne desegnitajn bildotabelojn kaj ĉ. 25,000 per bildoj klarigeblajn nociojn. Alfabeto listo je la fino de la verko ebligas tujan trovon de la ilustraĵo. Troviĝas jam tradukoj en la angla, franca kaj hispana lingvoj.

Por eldono de tiu ĉi vortaro en Esperanto “Esperanto Press” petas kunlaboron de seriozaj esperantistoj, kiuj povos partopreni tradukon de la teksto. La laboro bezonas konon de almenaŭ unu el la lingvoj en kiuj la bildvortaro jam aperis, kaj konon de iu profesio aŭ ŝatokupo.

Jen entrepreno subteninda. Kompetantaj s-anoj tuj vin anoncu al “Esperanto Press”, Oakville, Ontario, Kanado. De ĝi oni ricevos detalajn informojn pri la laboro.

EL HUNGARIO

ESPERANTO EN UNIVERSITATOJN — Sukcesa instruado de Esperanto okazas en la Universitato de Szeged en tri fakultatoj al 70 gestudentoj.

En la jura Universitato de Budapeŝt d-ro I. Szerdahelyi gvidas kursojn por 30 gestudentoj. Li ankaŭ havas du oficialajn kursojn en mezlernejo. Pluraj tiaj kursoj okazas en Hungario pro la koncerna ministra ordono, kiu permesas la instruadon en mezlernejoj kaj en ĝenerallernejoj. Ties sekvo estas, ke la Pedagogia Sindikato aranĝis kurson por pedagogoj, partoprenas pli ol 50, instruas Julio Baghy.

NOVAJ VERKOJ DE K. KALOCSAY — Dro K. Kalocsay ricevis la titolon de universitata profesoro. Li prilaboras hungarlingvan plenan gramatikon. Baldaŭ aperos hungara-esperanta frazaro kaj la materialo por “B” ekzamenoj pretigantaj Esperanto-instruistojn. Tiu ĉi libro estos interesa kaj uzebla ankaŭ en aliaj landoj.

PAROLADOJ KUN LUMBILDOJ — S-ano Balkányi faris lumbildparoladojn pri Esperanto, scienco, literaturo, instruado kaj pacmovado en Pionirdomo de Székesfehérvár, en Lernejo-Sanatorio kaj en lernejo en Budapeŝt. Li ankaŭ parolis antaŭ rondo de pedagogoj en urbeto Kazincbarcika. En budapeŝta grupo estis parolado pri Novzelando kun koloraj lumbildoj.

**BUDAPEŝTA RADIO PRI ES-
PERANTO** — La Budapeŝta Radio
Petöfi donas ĉiun duan sabaton 5
minutojn hungare pri Esperanto.
Oni devas peti el multaj landoj re-
gulajn elsendojn en Esperanto! La
elsendojn bone redaktas ĉe la radio
k-dino Erzsébet Kis.

Z-FESTO EN HUNGARIO — La
Hungara Esperanto-Asocio okazi-
gis la 14-an de decembro, 1963, en
bona aranĝo de ĝenerala sekretario
Ludoviko Kapitány sukcesan Zam-
menhof-memorifeston en fervojista
kulturĉambrego. Festparoladojn
diris Julio Baghy kaj hungara ver-
kisto Mihály Gergely. Samtempe
oni deklaris la junularan sekcion
de la Asocio, kiel hungaran sek-
cion de TEJO.

En kadro de la interesa pro-
gramo Mihály Sáróssi prezentis
kanton laŭ poemo de dro. F. Ŝzi-
lágyi: Zamenhof, kun propra
melodio.

Laŭ informoj
de P. BALKÁNYI

EL SOVETUNIO

SALUTON AL ĈINIO KAJ GDR

Moskvo. Komence de oktobro la
kutimajn renkontiĝojn de mosk-
vaj gesamideanoj oni translokigis
el la Centra Kulturparko de la
nomo de Gorkij al la Centra Kul-
turdomo de medicinistoj. Dum la
unua tia kunveno la 6-an de
okt., 63, nia prezidanto de Esp.
Sekt. ĉe CKDM k-do E. Ŝalnikov
faris informojn pri la 14-a datre-
veno de la fondiĝo de la Ĉina Po-
pola Respubliko kaj samtempe la
14-jubileo de la Germana Dem-
okratia Respubliko. Estis decidite
sendi salutleterojn al ĈEL kaj al
Esp-a grupo en GDR. Pri la men-
cio de tiuj honoraj datoj oni de-
cidis komuniki al la Domo de
Amikeco en Moskvo.

PRI HISPANA POEZIO

En la sama renkontiĝo k-do A.
Starostin prelegis bone preparitan
kaj fakte argumentitan raporton

ĈU VI AĈETIS JENAĴN ELDONAĴOJN EL LA NASKIĜLANDO DE LA KREINTO DE ESPERANTO?

La Faraono de Prus (3 volumoj)	zl. 105	Us\$5.00
Quo Vadis de Sienkiewicz	43	2.50
Internacia Fundamenta Elektra Vortaro		
Pola-esperanta, Esp-pola	13	0.55
Medalionoj de Nalkowska	14.50	0.60
Principoj de la Racia Muzikskribo de Wójcik (multobligita, fama projekto pri simpligo de notskribado)		
	8	0.35
Supera Kurso de Esperanto de Dreher (nur esp.)	6	0.25
Koloroj de Baghy	23	0.95
El la Vojaĝo tra Eŭropo (ilustrita albumo)	15	0.60
Nigra Kokino (libreto por infanoj)	3.50	0.15

Krome ankoraŭ aĉeteblaj estas la jenaj belaj jubileaj medaloj
kun skatoloj: arĝenta zl. 65, Us\$2.70; bronza zl. 55, Us\$2.30

ĈIUJN ĈI ELDONAĴOJN KAJ ESPERANTAĴOJN ONI
POVAS MENDI ĈE ARS POLONA, KRAKOWSKIE,
PRZEDMIEŚCIE 7, WARSZAWA, POLLANDO.

pri hispana poezio, kiu daŭrigas
prosperi kaj flori, spite al la nunaj
malfacilaj kondiĉoj de severa fa-
ŝista reĝimo en Hispanio. En la
aktuala hispana poezio estas tro
famaj poetoj: Himenis, Maĉado,
Lorka de Kor kaj aliaj proksimaj
al la popolo poetoj, kiuj respe-
gulas en siaj verkoj la suferojn de
simplaj homoj sub la jugo de fa-
ŝismo. Kelkaj progresemaj poetoj
elmigris el Hispanio kaj daŭrigas
sian noblan laboron eksterlande,
protestante samtempe kontraŭ la
nuna hispana reĝimo.

La Kuba revolucio instigis his-
panajn poetojn al novaj verkoj,
kiujn ili presis en aliaj landoj.

PRI RELIGIO, ATEISMAJ ORGANIZAĴOJ KAJ ESPERANTO

20, okt. la prelegon pri supreno-
mita temo faris D-ro K. Lavren-
tjev, kie li kun mirinda klareco
pruvis, ke Esperanto povas esti
uzata kiel por religiaj organizaĵoj
tiel ankaŭ por ateisma propagando

same kiel novaj rimedoj: kino,
radio, televido, muziko, eĉ dancoj,
per kiuj la servantoj de religiaj
kultoj penas allogi la simplajn
homojn al religio.

FILMO PRI 48 U. K. EN SOFIO

27, okt. al kunvenintoj en
CKDM gesamideanoj kvante pli ol
80 personoj estis projekciita kolor-
filmo en 2 partoj pri 48 U.K. en
Sofio, farita amatore de geedzoj
Ŝumilov, partoprenintaj la Kon-
greson. Komentojn al la filmo
donis K-dino N. Ŝumilova.

Post demonstrado de la filmo
k-do I. Bajenov el Gorkij trans-
donis al moskvanoj la plej var-
man saluton de tieaj gesamideanoj
kaj rakontis pri sukcesa esperanta
laboro en Gorkij urbo, kie nun
funkcias 3 esp-aj rondetoj kun
multaj gekursanoj. Ankaŭ li diris
pri sia turista vojaĝo tra Norda
Gaŭkazo kaj bordo de Nigra Maro,
kie li havis interesajn renkontojn
kun lokaj gesamideanoj.



NIA LIBROBRETTO

RAYMOND SCHWARTZ: **KIEL AKVO DE L' RIVERO**, 23.5 x 16 cm. 488 p. Eldonita de STAFETO. Prezo: broŝ., 3.00; tolbind., 3.80 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Kiam miaj okuloj vidis la amplekson kaj miaj preniloj perceptis la pezon de la nova verko de Schwartz (Ĉu "ŝverc"? Pardonon, ke mi ne scipovas ĝuste ĝin prononci, same kiel la nomojn de la plejparto de la lokoj kaj homoj en lia librego!), ĝoje ekfloris mia koro pro la subita ŝveliĝo de la originala litera turo de Esperanto. Milionoj da literoj en unu libro — kia livero! Kredeble tiu ĉi kontribuo proza estas io grandioza. Foje Schwartz (ne Ŝverc?) diris, "Eĉ la plej bona romano estas ĉiam nur . . . ornamo." Do lia romano estu monumenta ornamo, sed ne momenta nomaro baldaŭ forgesota kiel bonbono aŭ melono foje manĝita, ĝi estu vera ĉarmo sed ne

reva marĉo, kiu ne havas eliron. Nu, ni lasu la babilon, sed uzu la vidilojn. Kunlegu, kolegoj, ni vidu pri kia afero temas la miliono da literoj.

La unuaj sescent mil literoj (Pardonon, ke mi ne faris scienctulan kalkulon!) mozaikiĝis en kolorriĉajn bildojn pri la vivo de pan- sed ne pen-havaj mez-tavolaj kamparanoj kaj urbanoj francaj kaj germanaj en Loreno, Parizo kaj Berlino antaŭ la unua el la du lastaj lacigaj interbuĉadoj de homoj. Pierre, la heroo, franca junulo gastis en Berlino por lerni la germanan lingvon kaj lernigi la francan. Li enamiĝis al germana belulino Annemarie kaj edziĝis al ŝi senceremonie en la kriza momento de la ekleko de la militego.

La ceteraj formis bildserion ĉefe pri la maldolĉaj travivaĵoj de Pierre kaj Annemarie: ili disiĝis

dum la du militegoj, rekuniĝis nur post la repaciĝo kiam ili jam devis baldaŭ iri al tombejo.

En sia verko Schwartz firme konfirmas, ke la ordinaraj popoloj, ĉu francaj aŭ germanaj, estas vere pacamaj. Kio do estas la kaŭzo de ilia interbuĉado? La kruela kapitalo, fatala faŝismo kaj infera imperiismo — ĉiu klarvida, ne-verevitema homo tiel respondus. Sed en la libro de Schwartz (ne Ŝverc?) oni diras: ". . . la interpuŝiĝo de kontraŭaj interesoj inter *la homoj* estas neevitebla. La perspektivo ŝanĝiĝos, sed la problemo restos. . ." Bedaŭrante la faŝistiĝon de sia filo, Annemarie diris: "Ĉie en la mondo la grandega pliparto de la homoj naĝas kun la fluo. Rivero ne povas ne sekvi sian fluejon. . ." Jen la filozofio de kiu devenis la titolo "Kiel akvo de l' rivero". Kiu volas dividi la rolon de tiu pesimisma filozofia skolo? Mi ne. Mi fidus je la forto senfina kaj saĝo senlima de la milionaj laboruloj, kiuj kreis la mondon kun beletro kaj elektro, kiuj kreas kaj kreas teran paradizon sen parazitaj.

Post la tro rapida trarigardo, mi havis eble jam tro frivolan parolon pri la enhavo. Kaj pri la "lingvo, formo, stilo"? En lingva lerteco Schwartz ja ne bezonas plian rekomendon kaj lia stilo restas brila. Kvankam en konstruo oni povas rimarki certan malekvilibron, tamen tio ne malhelpas vin tralegi la libron. Kaj al tiu ĉi libro Schwartz-a (ŝverca?) ne mankas spico ŝerca kaj frapaj freŝaĵoj, jen ekzemploj: ekfraŭlinoj, ekideo, ekajoj de lipharoj, ĉjoĉjo-nomoj, ruĝestinta tuko, . . . Legu por vidi, ĝis kia alteco de artefiko kaj artifiko povas atingi la esperanta lingvo de litera turo.

Por eviti la kutiman malkontenton kaj de la aŭtoro kaj de la legantoj, mi preferas lasi la legantojn mem juĝi, ĉu la romano estas monumenta ornamo aŭ nur momenta nomaro, ĉu vera ĉarmo aŭ reva marĉo.

GLORON AL LA GRANDA OKTOBRO!

3, nov. en CKDM okazis esp-a vespero, dediĉita al 46-a datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio en Rusio. Kun siaj interesaj rememoroj elpaŝis moskva veterana esp-isto k-do Ŝumilov, kiu mem partoprenis en la Revolucio kiel soldato de malnova cara armeo, kie li fariĝis partiano.

La kunvenon vizitis k-do L. Ŝomlai el Budapeŝto (Hungario), kiu tutkore salutis la ĉeestantojn je la nomo de Hungaraj esp-istoj kaj interese rakontis pri historiaj etapoj de esp-a movado kaj pri ĝia nuna stato.

GEJUNULA ESPERANTA VESPERO

17, nov. okazis vespero de esp-a junulara grupo "FAJRERO". Pri

la 19-a Internacia Esp-a Kongreso de Junularo en Vraca (Bulgario), okazinta antaŭ la 48 U.K. en Sofio, dum 27/VII—3/VIII—1963 j.

SUKCESPLENAJ ESPERANTAJ KURSOJ

17, nov. en la Centra Moskva Instruista Domo kun vasta raporto kaj demonstrado de abundaj materialoj kaj fotoj pri 48 U.K. Tio instigis la administraron de Centra Moskva Instruista Domo organizi ankoraŭ du esp-ajn kursojn, kiujn gvidas k-dino E. Dolgiĥ kaj k-do B. Veselov (ekssubkolonelo) entute kun 43 personoj.

20, nov. en CKDM komenciĝis nova esp-a kurso por komencantoj, gvidata de k-do B. Veselov, kiun partoprenas 16 personoj.

Laŭ informoj de TEODORO KULAGIN

LAŬMUL



Korespondi Deziras

* 4 F-inoj el Porflegistina Liceo, kun flegistinoj el ĉi. pri ĉt.: 1. Barbara Grzywa; 2. Krystyna Koj; 3. Wiesława Krzyk; 4. Janina Zagrobelska. Adr. por ĉiuj: Mikolow, pow. Tychy, Panstw. Liceum Pielegniarskie, Pollando.

* Ladislao Magyar, Budapest IV. Szechenyi ter 7, Hungario.

* * *

OSKAR BERMAN, UEA fak-delegito por ĵurnalismo k lia edzino Doria petas landajn Esp. societajn en la tuta mondo, kiuj aranĝos perŝipan karavanon al 50-a U. K. okazonta en Japanio en 1965, sciigu nin! Antaŭan dankon. Adr.: 49, Tarna Strato, Hadera, Israelo.

* * *

Akademiano **IVAN KRESTANOF** en Sofia, str. 6 Septemvri, N-ro 2, Bulgario, serĉas ĉinan tradukon de sia **BULGARA ANTOLOGIO**, eldonitan en Ŝanhajo en 1940 sub la redakto de Prof. Ju Dau-juan. Ekzistas ankaŭ nova eldono. La angla-lingva nomo de la eldonejo estas: Chun Hwa Book Company Ltd. Bonvolu helpi lin kontraŭ duobla pago.

* Karlo Dozsa, Ĵurnalisto, Budapest VIII. Nepszin haz u.31.II.e 3, Hungario.

* Klubo "Internacia Amikeco", gimnazio "V. Zeuski", Karnobat, Bulgario, pri ĉt. Resp. garantiata.

* En kadroj de ISAE estas fondita **MATEMATIK-FIZIKA SEKCIO**. Ĉiujn fakulojn, kies fako koncernas matematikon, fizikon k kemion, ni invitas kunlabori en la sekcio. Detalojn bonvolu peti de unu el komitatanoj: V. V. Kulikov, Sazonova 33, Omsk 7, Sovetunio. Prof. Olav Reiersol, Sophus Lie gt. 8, Oslo, Norvegio. Carlo Minnaja, Viale Giulio Cesare 223, Roma, Italio.

* * *

ATENTU esp-istoj en la tuta mondo! Ni aranĝas grandskalan ekspozicion titolitan "Infanoj de la Mondo". Sendu al ni ĉion kunligitan kun laboro de la infanoj, ilia vivo, loĝkondiĉoj ktp. Ekspozicio enhavos infanpentraĵojn, il. pk. prezentantajn lernejojn, infan-domojn, infanludojn k samtempe laborojn de la maturiĝintaj homoj dediĉitaj al infanoj. Ankaŭ dankeme akceptos malgrandajn flagetojn vialandajn. Ĉiu sendinto ricevos de ni bele afrankitan resp. kun bela pk. prezentanta laŭdezire polan urbon, birdon, beston aŭ ŝirmgarditan floron. Anticipan dankon! Adreso: Rondo de Junaj Esp-istoj ĉe Ŝtata Infandomo, Gdansk-9, str. Brzegi 55, Pollando.

(Daŭrigo sur p. 76)

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro (2) 85 1964

Ĉefa Enhavo

Bildo sur la kovrilo — ŝpinistino
Foto de He Sijaŭ

En Kvin Jaroj

En la "Malriĉa Montvalo"

Ĉina Merkato en Prospero

Ĉinio Faris Grandiozan Aferon

Ĉinio, Paradizo sur la Tero

La Horloĝo ĉe Pekina Stacidomo

(poemo)

La Altaj Lernejoj de Pekino

Novaj Atingoj de Ĉina Literaturo

La Ĉina Palaca Lanterno kaj

Krizantemo (multekoloraj paĝoj)

La Unua Leciono

La Kinejoj en Ŝanhajo

La Komunuma Sekretario (novelo)

La Krono de Koko (fablo)

Kukolo (fablo)

Ĝang Heng

Veĉcio

Humuraĵoj

Skribas Niaj Legantoj

Bildo sur la dorskovrilo — Floristino
Pentrita de Hju Kihjong

~~~~~

★ Ĉiuj materialojn por nia redakcio aŭ por interŝanĝo sendu al P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio.

★ Ĉiuj perantoj, abonantoj kaj specimen-petantoj de nia gazeto sin turnu al **Libro-Servo de ĈEL**: P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

★ Tradukoj, represoj kaj ĉiuj aliaj bonvolaj utiligoj de la materialoj en nia gazeto estas permesataj kaj dezirataj, ni petas nur tion, ke oni menciu devenon de la materialoj kaj **sendu al ni du ekz. de la presaĵo** sur kiu aperis la konocerna materialo.

## DISTRA ANGULO

### Kiel Desegni?

Tiu ĉi celtabulo kun la sagoj desegnita per unu sola linio, kiu nek kruciĝas survoje, nek ripetas la vojon iuparte. Bonvole provu!

**Premio:** La unuaj tri legantoj kiuj ĝuste solvis la problemon, ricevos po belan serion de nove eldonitaj koloraj poŝtkartoj kun bildoj de oraj fiŝoj.

